


ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՆԱՅԵԼԻ
ՅԳՐԱՅՆԻՔՄՈՋԵՄՅ

A circular portrait of Ruder Bošković, a Croatian scientist, with a dark background and a gold border. The portrait shows him from the chest up, wearing a dark red coat and a white cravat. The background of the portrait has some faint text, including "DUBROVNIK" and "1787".

Ĉi-numere legu pri:
RUĐER BOŠKOVIĆ -KROATA SCIENCISTO
KROATIO - LA GUSTOJ DE MIA INFANAĜO
UZE-AKTIVECOJ
DETLEV BLANKE - 70-JARA
22-A MKR EN SLOVENIO
ERASMUS - EŬROPA PROGRAMO
POR STUDENTA MOVIĜEMO

5

2011

RESUMO

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
rmilos23@gmail.com

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković,
Vida Jerman, Jozo Marević,
Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Konstantaj kunlaborantoj:

Nicole Else (Aŭstralio), Małgosia
Komarnicka (Pollando), Imre
Szabó (Hungario)

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

6 numeroj en 2011

Konto de UZE:

2340009-1110321529
(Privredna banka, Zagreb)

UEA-kodo:

uzes-y

Ni proksimiĝas al la fino de nia kvina jarkolekto. "Zagreba Esperantisto" daŭre ricevas viajn simpatiojn, sed la redakcio ne ripozas senzorge sur la akiritaj laŭroj.

La frontpaĝo de tiu ĉi numero montras, ke ni tekste omaĝas la tricentjaran jubileon de la mondelstara kroata sciencisto Ruder Bošković, kion agnoskis eĉ UNESKO dum la kuranta jaro. Ĉi-numere ni prezentas al vi la strategiajn ideojn pri la rolo de UZE kiel organizo, ni raportas pri ĝia okazinta jarkunveno kaj prezentas la daŭrigon de ĉiumerkredaj prelegoj en Zagrebo, kiuj havas la celon reteni la altan nivelon de lingvoscio ĉe la zagrebaj esperantistoj. Vizitadu la prelegojn, ĉar ili ekzistas pro vi! Kreu la programojn, ĉar tiel vi kontribuas al la komuna celo.

La fama esperantologo Detlev Blanke fariĝis 70-jara. Okaze de lia datreveno, liaj kunlaborantoj honorigis lin per aperigo de volumo kiun recenzas unu el la kontribuintoj, d-ro Velimir Piškorec.

Raportoj svarmas sur niaj paĝoj. Pri la definitiva malapero de Esperanto-societo "Bude Borjan", la verajn kaŭzojn publike klarigas la likvidanto Anto Mlinar. La 22-an MKR fote kaj artikole prezentas al ni Vanja Radovanović, unu el ĝiaj ĉefaj motoroj. Ni ekscias pri la novaĵoj el Petrinja, kie okazas kurso kaj estas planata fondo de societo. Pri AIS-aferej raportas Zlatko Hinš, partopreninta la sesion en Rumanio. Siajn realigitajn programojn kaj siajn planojn por 2012 prezentas al niaj legantoj "Orbis Pictus" de Višnja Brnković.

El plumo de nia pola kunlaborantino ni ekscias pri ŝiaj impresoj dum la feriado en nia lando, kaj ni legas la duan (finan) parton de la priekologia esejo honore menciita en la Belartaj Konkursoj.

Divo Puditika, la kroata studento per la programo Erasmus restadas en Nancio, kaj per sia artikolo li malkovras la vivon en la nova loĝlando, rakontante pri la programo por studenta moviĝemo.

La nekutiman historion ni ekscias el la junaĝa albumo de la fama kroata esperantistino Emilija Heiligstein (Lapenna), kiu estas tute hazarde trovita ĉe strata brokantaĵ-vendisto. Iam da beletro kaj kelkaj ideoj por infanoj garnas la finon. Jen, ĉio en ĉi tiu numero. La sekva estos tema numero, en kiu ni detale priskribos la vivon de Gabrijel Divjanović kaj liajn ĉefajn atingojn: la popularsciencan gazeton "Homo kaj Kosmo" kaj la grupon de astronomoj-esperantistoj en la Zagreba Observatorio, kiuj precize antaŭ duonjarcento fondis la Esperantan kampadejon en Primošteno. Esperante ke vi amase subtenos niajn klopodojn por daŭra aperado per viaj abonoj, ni daŭrigos kun la regula aperritmo ankaŭ en 2012.

UZE TRANSPRENU LA TORĈON!

 UZE-estraro



La 23-an de septembro definitive ĉesis ekzisti la Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo, la plej granda kaj la plej malnova societo en Kroatio, kiu estas viŝita el la Registro de unuiĝoj de Respubliko Kroatio.

Jam en la malfonda jarkunveno estis klare, ke tiu ĉi evento kaŭzos plurajn problemojn, pri kiuj parolis ankaŭ la prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo Judita Rey Hudeček en la jarkunveno de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, okazinta la 27-an de oktobro. Zagrebo, kiu estis la centro de Esperanto en Kroatio, ĉiam havis kelkajn societojn. Nuntempe, post la malfondo de la societo "Bude Borjan", restas funkcii Studenta Esperanto-Klubo (SEK), Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA), Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj kaj Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE). En la antaŭaj periodoj, kiam en Zagrebo estis centoj da esperantistoj, la ekzisto de pluraj societoj ja estis evidente pravigebla, sed nun, kiam ŝrumpas la nombro de organizitaj esperantistoj, tiu fakto ŝajnas esti nereala. Objektiva analizo de la nuntempa situacio montras, ke SEK travivas grandan krizon pro generacia ŝanĝo. La membraro de KFEA ankaŭ ne kreskas, kaj supozeble la sama situacio estas ankaŭ ĉe la nevidantaj esperantistoj. UZE, kiu estis planita kiel komuna organizaĵo de ĉiuj zagrebaj esperantistoj kaj Esperanto-societoj, bazis sian funkciadon sur la tradicioj de la iama Zagreba Esperanto-Ligo (el la jaro 1981), sed ankaŭ UZE ne sukcesis altiri sufiĉe da membroj. La membraro de UZE nun estas iom pli ol 30. Tiu situacio pli-malpli respegulas la samajn problemojn kiujn alfrontas ankaŭ alilandaj esperantistaj societoj, kaj tio ne mirigu nin.

Post la malfonda jarkunveno de "Bude Borjan", oni intencis ne rigardi flegme la perdiĝon de la membraro de la malfondita societo. El la tegmenta organizaĵo de kroataj esperantistoj (KEL) venis la konsilo, ke la membraro de la malfondita "Bude Borjan" aliĝu al la sola "nefaka" kaj "nejunulara" societo nuntempe funkcianta en Zagrebo, respektive al UZE, aŭ ke oni fariĝu individuaj membroj de KEL. Tio kaŭzis iometan konfuzon en la vicjo de esperantistoj, kaj al la jarkunveno de UZE, kvankam invititaj, venis nur kelkaj iamaj membroj de "Bude Borjan".

La individua kategorio de membreco en KEL estis planita kiel kategorio kiun uzos la izolitaj esperantistoj, tiuj kiuj vivas en lokoj kaj regionoj sen Esperanto-societoj, sed Zagrebo certe ne estas urbo kiu apartenus al tiu kategorio, el kio sekvas, ke pli oportune estus aliĝi al iu el la ekzistantaj societoj, ol fariĝi individuaj membroj de KEL. Ĉar KFEA kaj Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj estas fakaj kaj SEK junulara societo, plej konsilinde estus aliĝi al UZE, kiu havas ĉiuagaŝan membraron kaj estas tutzagreba. Kompare kun la aliaj societoj, ĝi eldonas propran gazeton, kaj ekde la 16-a de novembro transprenis ankoraŭ unu funkcion de la malfondita "Bude Borjan": interkonsente kun KEL, UZE komencis organizi la ĉiumerkdajn prelegojn, kiuj estis tradicia aranĝo de "Bude Borjan", sed vizitataj de ĉiuj zagrebaj esperantistoj. La celo de tiuj prelegoj estas teni la altan nivelon de parola Esperanto inter la zagrebaj esperantistoj.

Male al la aliaj zagrebaj societoj, UZE havas ankaŭ la kategorion de kolektiva membreco. Tial la membro de UZE povas esti ankaŭ ĉiu zagreba societo.

Se la zagrebaj esperantistoj elektos la individuan membrokategorion de KEL, dissplitiĝos niaj fortoj kaj malkreskos niaj aktivecoj, respektive malfortiĝos la societoj. Strategie grava por la estonta stato de Esperanto en Zagrebo estus la decido kunigi la fortojn. Antaŭ ol ĝi malfondiĝis, tiun bezonon komprenis nur la Esperanto-societo "Bude Borjan" kiu estis kolektiva membro de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj. Se ĉiujn zagrebajn esperantistojn gvidus la sama ideo, ili komprenus, ke kuniĝi sub la komuna "standardo" de UZE, signifus akiri ankaŭ la komunan forton, kaj redoni al Zagrebo la iaman Esperantan brilon.

En la jarkunveno de UZE, Vlado Jurković eĉ proponis ke per aŭtomatismo ĉiuj membroj de "Bude Borjan" fariĝu membroj de UZE. Tiu ideo, kompreneble, ne povas realiĝi, ĉar la malfonda kunveno ne akceptis tian decidon. Sed, la Esperanto-societo "Bude Borjan" estis kolektiva membro de UZE, akceptinta la membriĝon de la societo per voĉdonado de siaj membroj, do la potenciala intenco amase membriĝi al UZE jam tiam ekzistis. Nun oni devus nur individuigi ĝin.

Kompreneble, en la nuna momento estas bezonata klarvida decido pri komuna utileco de forta kaj unueca Esperanto-organizaĵo en Zagrebo.

Praktika pensado instigas al nur unu ideo: la torĉon de "Bude Borjan" povas kaj kapablas transpreni nur UZE. Kombinante la homajn potencialojn, UZE kiu mem havas problemojn pri "rekrutado" de laborkapablaj kaj laborpretaj esperantistoj, akirus novajn homfortojn, kio tre gravas antaŭ la elektojaro 2012 por la prezidantaro de UZE. Se ni volas fari decidan paŝon, nun estas la ĝusta momento, ĉar en printempo 2012 ni devos elekti la novan estraron de UZE. Ju pli da membroj, des pli bona la gvidantaro, kaj des pli granda ebleco por estonta kvalita laboro.

Ĉi tiu artikolo do havas la celon planti en ĉiu zagreba esperantisto la demandon: ĉu mi aliĝu al UZE kaj fortigu la komunan societeton de ĉiuj zagrebaj esperantistoj, aŭ mi aliĝu individue al KEL kaj displitu la zagrebajn fortojn. La individuaj membroj de KEL el la tuta lando faras unu solan unuon dum la asembleaj elektoj de KEL. La zagreba societo "Bude Borjan" ĝis nun havis 8 membrojn en la Asembleo de KEL. Per malfondo de la societo, Zagrebo perdas tiujn 8 delegitojn, el kiuj eĉ 5 estis

membroj de la estraro de KEL. Ĝi povas reakiri ilin nur per aliĝo de la eksa membraro de "Bude Borjan" al iu ekzistanta Esperanto-societo en Zagrebo. Por konservi la influon de zagrebaj esperantistoj en la asembleo de KEL, UZE denove invitas vin fariĝi tuj kaj senprokraste membroj de la komuna zagreba societo kaj tiel fortigi ĝin, redonante al la zagrebanoj la merititan nombron da delegitoj en la Asembleo de KEL.

Sub la slogano "UZE transprenu la torĉon!" kolektiĝu en UZE ĉiuj zagrebaj esperantistoj! La aliĝilon vi povas trovi en la portalo de "Zagreba Esperantisto" http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com_remository&Itemid=11, aŭ peti ĝin retroŝte de UZE zagreba.esperantisto@gmail.com. La lasta jarkunveno akceptis la konkludon, ke ekde la jaro 2012 la jara membrototizo estos 120,00 kunaĵoj, kio inkluzivas 6 numerojn de la gazeto "Zagreba Esperantisto" kaj la oficialan KEL-gazeton "Tempo". Se vi aliĝas al UZE, vi aŭtomate estas ankaŭ kolektiva membro de KEL, kio gravas antaŭ la tempo de aliĝoj al landa kongreso en Koprivnica. Estante membro de KEL, vi pagos malpli koston kongreskotizon.

ĈIUSEMAJNAJ PRELEGOJ EN ZAGREBO

Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) informas ĉiujn samideanojn, ke la kutimaj prelegoj kiuj okazadis merkrede, organizataj de Esperanto-societo "Bude Borjan" kiu estas malfondita ĉi-jare, plue estos organizataj de UZE. La prelegoj okazados **MERKREDE je la 19h00 en la sidejo de Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, Zagrebo.**

Bonvolemaj prelegantoj sendu siajn proponojn por prelegi, menciante la daton kaj la temon. Eksterlandaj esperantistoj kiuj travojaĝos Zagrebon aŭ restados en nia urbo, informu nin kaj klopodu prezenti al ni sian propran prelegon. La prelegoj estu en Esperanto, sed ne nur pri Esperantaj temoj. Ilia celo estas daŭre teni la altan nivelon de lingvokono de zagrebaj kaj kroataj esperantistoj, respektive ankaŭ amikumadon en la samdieana rondo.

Jen la listo de prelegoj al kiuj UZE invitas vin dum novembro kaj decembro 2011:

NOVEMBRO 2011

la 16-an - Josip Pleadin: **Renkonte al la jubilea 10-a kongreso en Koprivnica** (jam okazis!)

la 23-an - Marija Jerković: **Kroataj Esperanto-lernolibroj kaj iliaj aŭtoroj** (jam okazis!)

la 30-an - Radenko Milošević: **Mare nostrum - nia trezoro en Esperanto**

DECEMBRO 2011

la 7-an - Zlatko Hinšt: **Faklaboro enkadre de TAKE - Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj**

la 14-an - Spomenka Štimec: **2012 - la jaro de Tibor Sekelj**

Akceptataj proponoj por januaro kaj februaro 2012. Bonvolu proponi al:

zagreba.esperantisto@gmail.com

Estimataj legantoj!

Se vi ne renovigis vian abonon al "Zagreba esperantisto" ĉi tiu numero estas la lasta kiun ni sendas al vi. Jarabono por 2012: 18,00 eŭroj / 120,00 kunaĵoj



LA JARKUNVENO DE UZE

 Redakcia kompilo

Post preskaŭ 19 monatoj Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) okazigis sian regulan jarkunvenon. La pasinta jarkunveno okazis la 26-an de januaro 2010, kaj post ĝi UZE travivis grandan krizon, plejparte kaŭzitan per manko de financoj, kio kaŭzis stagnadon de ĉiuj projektoj kaj planoj. La ĉi-jara jarkunveno okazis la 27-an de oktobro en la Granda salono de Kroata Ekonomia Ĉambro - Zagreba Ĉambro. Bedaŭrinde, partoprenis ĝin nur 13 membroj kaj 3 gastoj, kio tamen sufiĉis por havi kvorumon. Prezidis la jarkunvenon la prezidanto de UZE Radenko Milošević.

La jarkunvenon ĉeestis ankaŭ la prezidantino de KEL, kiu en sia salutparolado menciis la gravecon de Zagrebo en la esperantista mondo. Ŝi informis la ĉeestintojn ankaŭ pri la malfondo de la zagreba Esperanto-societo "Bude Borjan", akcentinte ke nun sur UZE kuŝas la granda respondeco pri la estonteco de Esperanto en Zagrebo. En la diskutoj estis pritraktitaj pluraj temoj, el kiuj ni menciis nur la plej gravajn.

La prezidanto de UZE anoncis okazigon de elekta jarkunveno komence de 2012, menciinte ke UZE transdonis la peton al KEL por uzi kiel la oficialan adreson la adreson de la KEL-sidejo en la strato Kneza Mislava 11. Kiel kaŭzon de malmultnombra partopreno en la kunveno oni menciis la malĝuste elektitan tempon kaj nesufiĉan kunlaboron inter la societoj kaj unuopaj esperantistoj.

Zlatko Hinšt opinias, ke la eldonado de "Zagreba Esperantisto" tro multekostas, kaj proponas ke ĝi ne aperadu regule sed porokaze, kaj ke la informoj distribuiĝu pere de la retpaĝaro de UZE. Li ankaŭ opinias, ke per ŝparoj en la eldonado de la gazeto, oni povus havigi monon por aliaj projektoj. Tion refutis kaj la prezidanto Milošević kaj la plenumredaktoro Pleadin, kiuj informis la ĉeestantojn, ke la mono ricevita por "Zagreba Esperantisto" de Ministerio pri kulturo estas strikte difinita por tiu celo, kaj sekve neuzebla por aliaj projektoj. Se ni ĉesus eldoni la gazeton, UZE tamen ne havus pli da mono por aliaj projektoj, ĉar ni ne ricevus la subvencion de la Ministerio. Pri la preskostoj diskutis Pleadin, kiu klarigis, ke la produktokostoj estas multe sub la merkataj prezoj, ĉar la presisto rezignis pri propra gajno en la tempo kiam UZE travivis finanĉan krizon. La prezidantino de KEL opinias, ke la gazeto estas tro kvalita, kaj ke ĝi en nerealaj lumo prezentas Esperanton kaj

esperantistojn en Kroatio. Al ŝi respondis Marija Jerković, kiu opinias ke malaltigo de la kvalito de la gazeto ne estas akceptebla, ĉar pro sia kvalito ĝi akiris legantojn en eksterlando, kaj oni ricevas nur laŭdojn pri ĝi. Ŝi mem partoprenis la ceremonion dum kiu la plenumredaktoro Pleadin estis honorita per pola "Premio Spiegulo" ĝuste pro la kvalito de la gazeto. Judita Rey Hudepek aldonas, ke, se por la gazeto ekzistas financaj rimedoj, ĝi retenu la saman kvaliton, sed ankaŭ demandas kion alian UZE faris krom eldoni la gazeton? Respondis al ŝi Pleadin, menciante krom la eldonitajn 17 numerojn de la gazeto ankaŭ aperigon de lernolibro de Stano Marček kaj ĝian solenan prezenton kun partopreno de la aŭtoro, funkciigon de propra portalo, organizadon de kursoj en Utrine kune kun Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto. UZE ankaŭ organizis helpon al grupo de bjalistokaj esperantistoj kaj ilina loĝigon en Rijeka kaj en Zagrebo, organizis dusemajnan prelegvojaĝon de rusaj esperantistinoj, kion akceptis pluraj Esperanto-societoj en Kroatio, subtenis la funkciadon de Dokumenta Esperanto-Centro kaj tiucele eldonis reklamprospekton, organizis standon en la UK en Roterdamo kaj tie distribuis informilojn, subtenis la fondiĝon de ES en Bjelovar, partoprenis preskaŭ ĉiujn Esperanto-aranĝojn en Kroatio, kunorganizis la simpozion en Filozofia fakultato okaze de la centjariĝo kaj la solenan feston en la Konsilantarejoj e Zagrebo, ktp.


Ĉar UZE ne posedas propran societejon, Tomislav Radić proponis, ke oni sendu peton por uzado de senpagaj ejoj al Konsilantaro de la kvartalo Donji Grad, kiu disponas pri 14 tiaj ejoj, uzebaj por diversaj celoj.

Srečko Radulović informis pri la komuna iniciato de UZE, DEC kaj Esperanto-societo Sisak por fondo de Esperanto-societo en Petrinja kaj pri la tie gvidota kurso.

Akceptitaj estas ĉiuj raportoj kaj laborplano por 2012, el kiuj videblas ke UZE progresas malgrandpaŝe, sed tamen eliras el la krizo kiu okupis ĝin dum pasintaj 19 monatoj.

Ĝis nun UZE ne postulis pagadon de membrotizoj, sed en la nuna jarkunveno estas akceptita la konkludo, ke por 2012 la kotizo estu 120,00 kunaĵoj, kio inkluzivos ankaŭ la tutjaran abonon al "Zagreba Esperantisto". Krome, la membroj ricevdos la oficialan KEL-gazeton "Tempo".

Sur la foto: Cyril Brosch, Detlev Blanke kaj Sabine Fiedler



Detlev Blanke - 70-jara



✍ Velimir Piškorec

📷 Sebastian Kirf

Florilegium Interlinguisticum - Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag. Herausgegeben von Cyril Brosch und Sabine Fiedler, Frankfurt am Main (...): Peter Lang, 2011, 424 paĝoj.

La 30-an de majo 2011 la fama germana interlingvisto kaj esperantologo d-ro habil. Detlev Blanke fariĝis 70-jara. Omaĝe al tiu nakiĝtago interlingvistoj Sabine Fiedler kaj Cyril Brosch invitis pasintjare kolegojn kaj amikojn de Detlev Blanke skribi artikolojn por publikigota festlibro. La libro sub la titolo **Florilegium Interlinguisticum** estis lanĉita ĉi-jare en Berlino ĝuste je la tago de la naskiĝtagreveno de Detlev Blanke, kadre de solena festo organizita de **Gesellschaft für Interlinguistik** (Asocio por Interlingvistiko), kiun D. Blanke fondis kaj jam dudek jarojn prezidas. La granda respekto por li kiel homo kaj fakulo kaj liaj agado kaj publikaĵoj respeguliĝas en la germanlingva festlibro kun 22 kontribuoj de aŭtoroj el Germanio, Nederlando, Rusio, Kroatio, Japanio, Usono kaj Irlando.

Biografie pri Detlev Blanke

Detlev Blanke naskiĝis en Neumünster la 30-an de majo 1941 kaj junulis en distrikto Wismar. Post la abituriĝo en 1959 li studis ĉe la Rostoka universitato kaj post la finitaj studoj laboris 4 jarojn kiel gimnazia profesoro pri la germana lingvo kaj geografio. Jam en 1957 li memlernis Esperanton kaj tuj komencis prelegi pri ĝi, gvidi kursojn kaj verki artikolojn por gazetoj. En la jaro 1964 li organizis en la Universitato de Rostock la unuan interlingvistikan seminarion en tiama GDR. De 1968 ĝis 1990 li estris la **Fakon Esperanto** de la socia organizaĵo **Kulturbund** kaj sekretario en la **Centra laborcirko Esperanto ĉe Kulturbund** (ekde 1981 ĉe GDREA). En 1970-1990 li redaktis la revuon **der esperantist**. En majo 1991 li aktive kunlaboris ĉe la unuigo de du naciaj germanaj Esperanto-asocioj.

En la jaro 1976 li doktoriĝis ĉe Humboldt-Universitato en Berlino pri kompara lingvistiko (vortfarado en Esperanto kaj en la germana) kaj en 1985 habilitiĝis pri planlingvoj. Tiamaniere li enkondukis interlingvistikon en la universitatan kaj scian medion, preparinte la vojon por estontaj planlingvaj studoj. En 1988 li fariĝis honoraria docento por interlingvistiko ĉe Humboldt-Universitato.

La kontribuo de D. Blanke al interlingvistiko estas multflanka. Li estas ne nur aparte fruktodona interlingvistika aŭtoro, kies riĉa bibliografio enhavas pli ol 1750 unuojn, sed liaj aktivecoj instigis fondadon de sciencaj strukturoj, kiuj ebligis seriozajn interlingvistikajn studojn kaj faciligis publikigadon kaj diskonigadon de interlingvistikaj esplorzakoj kaj scioj. En tiu kadro menciindas la fakto, ke li jam en 1970 fondis fakan grupon **Interlingvistiko / Esperantologio** ĉe GDREA, kiu fakte estis bazo por en 1991 fondita **Gesellschaft für Interlinguistik (GIL)**.

Ekde 1974 D. Blanke kunlaboras en **Centre for Research and Documentation on World Language Problems** kaj membras en la redakta komitato de la prestiĝa sociolingvistika, lingvopolitika kaj lingvoplanada fakrevuo **Language Problems & Language Planning**.

Krom tiuj aktivecoj menciinda estas la bibliografia dimensio de lia laboro: kune kun Humphrey Tonkin li prizorgis la sekcion pri help- kaj internaciaj lingvoj ĉe la fama Bibliografio de libroj kaj artikoloj pri modernaj lingvoj kaj literaturoj de **The Modern Language Association of America**. D. Blanke kontribuis ankaŭ al la kampo de terminologio de Esperanto kaj aktivis en **Terminologia Esperanto Centro** (1977-97). Li organizis multajn fakajn eventojn kaj aranĝojn pri interlingvistikaj temoj, interalie esperantologiajn konferencojn dum UK-oj kaj jarkoferencojn de GIL. Aparte menciindas lia mentora, konsildona kaj fake kaj home instiga agado inter studentoj kaj junaj fakuloj pri planlingvoj.

D. Blanke influis ankaŭ la evoluon de interlingvistiko en Kroatio, preleginte en 2008 pri interlingvistiko kaj esperantologio ĉe la Filozofia fakultato en Zagrebo kiel gasto de la Germana fako, pri kio detale informis ankaŭ "Zagreba Esperantisto" es sia numero 3/2008, p. 77-78. Ne nur tiamaniere, sed ankaŭ donacinte diversajn interlingvistikajn publikaĵojn al la aŭtoro de ĉi tiu artikolo kaj konsilinte lin fake kaj home, D. Blanke subtenis scian kaj instruadan interlingvistikan agadon en Kroatio kaj kontribuis al prestiĝo de interlingvistiko kiel serioza filologia fakto en kroata universitata kaj akademia medio.

Florilegium Interlinguisticum

En la festlibro **Florilegium Interlinguisticum** oni povas legi pri diversaj interlingvistikaj temoj: lingvoplanado kaj lingvopolitiko, komparaj studoj pri etno-

kaj planlingvoj, lingvoinventado por literaturaj kaj aliaj celoj kaj leksikografiaj, lingvoinstruaj kaj stilistikaj studoj pri Esperanto. Ni koncize menciuj ĉiun festlibran artikolon por ilustrati la riĉan temaran spektron de la libro. La titoloj de kontribuaj aperoj en tiu recenzo Esperantigitaj el la germana.

Goro Christoph Kimura prezentas en sia artikolo **Tipologio de interlingvaj komunikaj eblecoj** interlingvistikon kiel sciencon okupiĝantan pri internacia komunikado kaj ellaboras la tipologion de komunikadaj eblecoj.

La kontribuoj de **Klaus Schubert**, titolita **Pri konscia intervenado en la lingvo**, temas pri fakkomunika optimigo, rigardante "naturecon" kaj "artefaritecon" kiel du polusoj de la sama kontinuo.

Simila perspektivo troviĝas ankaŭ en la teksto de **Humphrey Tonkin** sub la titolo **Planlingvoj kiel modeloj de lingvoplanado**, kie la aŭtoro priskribas Esperanton kiel rezulton de intensaj lingvoplanadaj procezoj rilate al korpuso, statuso, lingvolernado kaj prestiĝo de la lingvo.

Seán Ó Riain pritraktas en sia artikolo **La irlandano lingvo, Esperanto kaj eŭropa plurlingveco sur la fono de eŭropa plurlingveco** la historian kaj nunan rolon de sia gepatra lingvo, la irlandano, kiu estas malmulte parolata kaj malfacile lernata, kaj proponas kiel unu el solvoj de tiu problemo la propedeŭtikan valoron de Esperanto.

Sabine Fiedler en sia studo **La temo planlingvoj (Esperanto) en la aktuala lingvopolitika fakliteraturo** esploras ĉu kaj kiuj aspektoj de planlingvoj kaj precipe de Esperanto troveblas en la nuntempa fakliteraturo pri lingvopolitiko, identigante ĉe ĉi-rilataj fakuloj pozitivajn, negativajn kaj kontroversajn sintenojn al planlingvoj kaj Esperanto. Al pozitivaj sintenoj apartenas egalrajteco kaj efikeco de internacia komunikado kaj propedeŭtika

valoro ĉe lernado de fremdlingvoj. Kiel kontraŭargumentoj menciitas malbona reputacio de Esperanto kiel utopia kaj malmoderna ideo kaj mankantaj kampoj de apliko, dum kiel kontroversaj sintenoj identiĝis la eŭropeca karaktero de la lingvo, ekzisto de Esperanta kulturo kaj la rolo de gepatraj lingvoj.

Sur la fono de la historia evoluo de la nederlanda lingvo kaj ĝia parenceco kun la germana en la familio de germanaj lingvoj **Wim Jansen** prezentas en sia artikolo **La nederlanda – la germana – Esperanto: ĉeno, kiu ligas** 49 nederlanddevenajn pruntvortojn en Esperanto.

En la kompara studo **Kiel planlingvoj dividas spacon? Studo pri Esperanto, Ido, Volapük, Interlingue (Occidental) kaj Interlingua** Cyril Brosch analizas la koncepton de spaco, montrante unuflanke, ke aŭtoroj de tiuj planlingvoj mal-konscie transprenis spackonceptojn el eŭropaj lingvoj, sed ke aliflanke malgraŭ tiuj tendencoj la konceptigo de spaco en la konsiderataj planlingvoj estas ankaŭ aŭtonoma.

Heidemarie Salevsky okupiĝas en sia artikolo **Potenco, kulturo kaj traduko** pri la potenco de unuopaj kulturoj kaj lingvoj bazitaj sur la politika kaj ekonomia forto, kiu respeguliĝas ankaŭ en tradukado. Ŝi analizas tiun fenomenon surbaze de la cirkonstancoj ĉe la tradukado de verkoj de kirgiza verkisto Ĝingis Ajmatos en la germanan.

Bengt-Arne Wickström elaboras en sia studo **Lingvo kiel renoviĝebla resurso. La kapacito de diversaj lingvoj hejmiĝi fremdvortojn** la modelon por priskribo de la kapablo de lingvoj transpreni fremdvortojn, asertante ke tiu modelo identas kun la modelo por analizo de la apliko de renoviĝeblaj resursoj.

Wilfried Stölting diskutas en sia eseo **Lingvoinventado** plurajn interlingvistikajn temojn en la vasta spektro ekde la lingvolernado kaj dulingveco, lingva arkeologio trans Zamen-

hofaj reformoj de Esperanto ĝis lingvoinventaĵoj de J. R. R. Tonkin, starigante interalie la demandon, kiom amplekse fikciaj lingvoj povas helpi ĉe la kompreno de planlingvoj.

La studo **Panslavaj variaĵoj** de **Věra Barandovská-Frank** donas superrigardon de slavaj lingvoj kaj pritraktas panslavismon kiel lingvan, kulturalan kaj politikan ideologion, kiu ludis gravan rolon kiel fundamento por multnombraj panslavaj lingvoprojektoj.

Claudia Mannewitz pritraktas en sia artikolo **La nord-slava** konstruadon de kulturoj, vidante en tiu fenomeno similaĵojn kun konstruado de lingvoj. Surbaze de nordslavaj lingvaj projektoj kaj analoge al la anglalingva nocio de *conlangs* (constructed languages - 'konstruitaj lingvoj') ŝi pledas por la nocio *concultures* (constructed cultures - 'konstruitaj kulturoj').

En la titolo de la artikolo de **Johannes Klare** estas precize difinita la pritraktita temo: **Elpensitaj (fikciaj) lingvoj en kelkaj pli malnovaj francaj literaturtekstoj sekvantaj "Utopia" (1516) de Thomas Morus**. La artikolo ofertas siaspecan vojaĝon tra jarecentoj de la franca utopia kaj fantazia beletra literaturo el la perspektivo de en ĝi identigitaj inventitaj lingvoj.

La kontribuajo de Otto Back **Rimarkoj al Reformita Esperanto de Zamenhof el la jaro 1894** prezentas genezon kaj lingvajn detalojn te tiu lingvoprojekto de Zamenhof. La aŭtoro montras en sia detaliĉa analizo, ke temas pri la serioze ellaborita projekto, spite al la ofte aŭdata opinio, ke Zamenhof konscie faris tiun projekton malbonkvalita por ke ĝi estu malaprobata de tiamaj esperantistoj.

Erich-Dieter Krause skribas en la artikolo **Azia flaŭro kaj faŭno en la vortprovizo de Esperanto** pri terminologiaj problemoj, kiujn oni alfrontas ĉe la Esperantigo de la etnolingvaj nomoj por la riĉa mondo de aziaj plantoj kaj bestoj.

Rudolf-Josef Fischer prezentas en sia artikolo titolita **Esperanto en kvazaŭ-L1-lernado** el lingvobiografia kaj psikolingvistika vidpunkto la lernadon de Esperanto ĉe la infano, kiu kontaktas kun sia Esperanton parolanta avo. Krom strukturlingvistikaj detalaj observoj, la aŭtoro substrekas, ke tiaspeca lernado kaj komunikado havas ankaŭ emocian kaj famililigigan funkcion, montrante ke la uzo de la planlingvo Esperanto en tiu dimensio ne diferencas de la uzo de etnaj lingvoj.

La aŭtoro de ĉi tiu recenzo skribis por la festlibro la studon sub la titolo **Kroataj Esperanto-lernolibroj. Aŭtoroj, metodoj, verkoj**, kie li prezentis rezultojn de sia analizo de kroataj Esperanto-lernolibroj ekde tiuj de Danica Bedeković kaj Mavro Špicer el la jaro 1908 ĝis hodiaŭo. Ĉiu verko estis pritraktita el la en-hava, metodologia, biografika kaj ideologi-historia vidpunkto.

Oksana Burkina priskribas en sia kontribuajo sub la titolo **Kelkaj rimarkoj pri prononcadnormo en Esperanto** teoriajn kaj praktikajn aspektojn de parolata Esperanto kaj difinas similecojn kaj diferencojn rilate al la statuso de norma lingvaĵo en etnaj lingvoj.

La artikolo de **Till Dahlenburg** **Figuroj de stilo en Esperanto – ilia apliko kaj iliaj limoj** enhavas unuflanke komparan analizon de figuroj de stilo en la germana kaj Esperanto, aliflanke ĝi povas esti legata kiel siaspeca enkonduko en stilistikan terminologion de Esperanto el tradukarta vidpunkto.

Toon Witkam okupiĝas en sia artikolo **Konkordancoj por Esperantaj vortoj** pri la problemoj de elektronikaj korpusoj de Esperanto, prezentante sian projekton GugloKVEK.

Fritz Wollenberg analizas en sia studo **Novajo kun tradicio – la germanlingva biografio de la fondinto de la lingvo Esperanto, Lejzer Ludvik Zamenhof** la plej recentan biografion de Zamenhof,



verkitan de A. Künzli, ofertante samtempe superrigardon pri aliaj germanlingvaj laboraĵoj pri Zamenhof kaj inkludinte ankaŭ beletran literaturon. La aŭtoro pledas por la disvastigo de scioj pri humanisma agado kaj ideoj de Zamenhof kaj lia lingvoinventita kaj kulturhistoria signifo ankaŭ ekster Esperantujo.

La lasta kontribuado en la festlibro estas skribita de **Ulrich Becker** sub la titolo **Esperanto-eldonado en cirkonstancoj de**

tutmondigo: defioj kaj ŝancoj. Priraktitaj estas konsekvencoj de novaj teknologiaj evolutendencoj, ekzemple Print-on-Demand kaj elektronikaj libroj, por Esperanto-eldonado.

Ni konkludu: la festlibro **Florilegium interlinguisticum** estas la plia pruvo, ke nuntempa interlingvistiko estas vigla esplorkampo kadre de lingvoscienco. La 22 kontribuadoj ne nur respegulas la vastan spektron de interlingvistikaj temoj, sed ankaŭ

ilustras la riĉecon kaj diversecon de metodologiaj aliroj en tiu fako.

Ĉi-loke ni uzu la okazon por gratuli al Detlev Blanke lian 70-an naskiĝtagon kaj deziri al li bonan sanon kaj plian sukcesplenan agadon en Interlingvistikujo. Oni danku al redaktoroj de la festlibro, Sabine Fiedler kaj Cyril Brosch, kiuj investis multan tempon kaj grandan laboron por organizi kaj sukcese realigi ĉi tiun altkvalitan kaj imitindan eldonprojekton.

ESPERANTO-SOCIETO “BUDE BORJAN” DEFINITIVE EKSA



Anto Mlinar

Sub titolo “La historia precedenco” Josip Pleadin, citante objektivite la dokumentojn de kompetentaj organoj de la societo (Estraro, Asembleo, Prezidanto), informis la legantaron, ke estas **malfondita la zagreba Esperanto-societo “Bude Borjan”** (“Zagreba Esperantisto” nro 1/2011, paĝo 3) kaj la nunan artikolon bonvolu legi kiel ties daŭrigon.

La publikigita informo estis siaspeca ŝoko kiu provokis kelkajn komentojn sekvontnumere (ZE 2/2011, paĝo 63). Ĉar la komentoj nun ne plu estas tro gravaj, mi daŭrigos komenti la tutan okazaĵon per la aferoj kiuj sekvis. Dume, sufiĉe longan tempon post la informo aperinta en “Zagreba Esperantisto”, la societo tamen plu ekzistis, ĉar la kompetentaj organoj de la societo devis plenumi la leĝan procedon kies finrezulto devus esti la eksigo el la registro. Pro tio la Asembleo nomumis la societatan prezidanton Anto Mlinar esti likvidanto de la societo kaj li estis devigata kontakti la kompetentajn organojn de la urba administracio. La fina rezulto de tiuj kontaktoj estis la Raporto de la likvidanto, kiun oni pozitive akceptis, kaj la

12-an de septembro 2011 (do, tri monatojn post la Jarkunveno) la Urba oficejo por ĝenerala administrado, decidis:

“Oni konstatas, ke la unuigo titolita Esperanto-societo “Bude Borjan”, kun la sidejo en Zagrebo, Kneza Mislava 11 - chesas ekzisti;

Oni preskribas la eksigon de la unuigo titolita Esperanto-societo “Bude Borjan”, kun la sidejo en Zagrebo, Kneza Mislava 11, el la Registro de unuigoj de Respubliko Kroatio;

La ĉeso de ekzisto kaj eksigo de ĉi-tiu unuigo estos notita en la Registro de unuigoj de Respubliko Kroatio sub la registronumero 21000246.”

Sekvas la argumentado de tiuj decidoj el kiu mi akcentas ke “La unuigo ne havas posedaĵojn kaj tial ne ekzistas la propono pri ilia distribuo”.

Kompreneble, oni povas stariĝi la demandon ĉu ĉio ĉi estis necesa. La respondo al tia demando gvidas nin al alia problemo de Esperanto-societo “Bude Borjan”: al perdo de la sidejo en Amruševa 5 en Zagrebo kaj al posta postulo pri pago de granda monsumo je konto de la

perdita profito de la proprietulo de la ejo, kio provokis longdaŭran tribunalan proceson, en kiu la societo ne havis ian ajn ŝancon. Ni konsultis nian advokaton pri nia ideo ĉion ĉi solvi per la malfondo de la societo, kaj fine ni faris tion por ne daŭrigi la agonion de la societo. Tuj post la akceptita decido pri malfondo, nia advokato sciigis la tribunalon pri tiu fakto, kaj la tribunalo decidis ĉesigi la proceson.

Nun ni povas diri ke la societo definitive ne plu ekzistas kaj, ĉar ĝi estis la mejloŝtono de la zagreba kaj, mi rajtas diri, ankaŭ de la kroata Esperanto-movado, tre gravas ke la tegmenta organizo Kroata Esperanto-Ligo pere de sia estraro pritraktu la problemon kaj rekomendu al la membraro de la eksa societo kiel agi estontece. Nun ekzistas provizoraj solvoj aliĝi al Unuigo de zagrebaj esperantistoj (UZE), sed tio ĉi-momente ankoraŭ ne estas tute klara, kaj multaj eksmembroj de “Bude Borjan” deklariĝas kiel individuaj membroj de Kroata Esperanto-Ligo. Ĉiu rajtas mem elekti kie membriĝi, sed oni klopodu eltrovi bonajn solvojn por ke la membraro povu pli bone orientiĝi.

22-a MKR:

  Vanja Radovanović



SUNUMANTE SUR 2236 METROJ!

En suda Eŭropo la somero ĉi-jare estis tre varma kaj daŭris pli longe ol kutime. Fine de septembro la temperaturoj ankoraŭ estis somermezaj, marborde la plaĝoj estis ankoraŭ plenaj de naĝantoj kaj sunumantoj, kaj la altajn montojn anstataŭ la unua neĝo beligis forta suno. La ĉi-jara 22-a MKR (Montkabana Renkontiĝo) uzis la lastan belegan kaj sunplenan kvazaŭsomeran semajnfinojn, de la 28-a de septembro ĝis la 2-a de oktobro, por gvidi siajn partoprenantojn al la montaro Karavanke, kiu etendiĝas en pli ol 100 kilometroj inter la itala-slovena limo kaj okcidenta Kroatio. La aranĝo estis organizita en la montkabano Valvazorjev dom (1180 m) proksime al la plej nordokcidenta slovena urbo Jesenice, kaj ĉi-jare partoprenis ĝin 25 personoj el 6 landoj (Kroatio, Hungario, Slovakio, Ĉeĥa Respubliko, Svedio kaj Slovenio), inter kiuj ankaŭ 5 infanoj.

La aranĝo, kiel kutime, daŭris kvar tagojn, inter ĵaŭdo kaj dimanĉo, el kiuj la vendredo kaj sabato estis rezervitaj por tuttagaj ekskursoj. Spertaj montmigremuloj tradicie strebis surgrimpri la plej altajn montojn en la ĉirkaŭaĵo kaj promenademuloj samtempe malstreĉe vizitis interesajn najbarajn punktojn en la proksimeco.

La unua ekskurstago gvidis la ekskursantojn tra pluraj paŝtejoj kaj vastaj arbaroj al la valo de rivereto Završnica kaj montkabano ĉe ĝia fonto je 1425 metroj. Tiuj por kiuj ne sufiĉis la 3-hora migrado ĝis la kabano, daŭrigis la migradon al la pinto Veliki vrh (2060 m) sur la monto Begunjščica. La longa marŝado donis la fruktojn: la vastan superrigardon de la tuta nordokcidenta Slovenio.

Tamen, tiu ekskurso estis nur "preparo" por la ĉefa celo de la aranĝo: grimpo al la plej alta pinto de la montaro Karavanke. La pinto nomiĝas Stol (slovenlingve signifanta "seĝo") kaj ĝi estas la plej alta, 2236-metra pinto, ne nur en tiu montarĉeno, sed ankaŭ en la tuta ĉirkaŭaĵo kun multaj pintoj inter 2000 kaj 2200 metrojn altaj. Tio signifas ke la rigardo de ĝi estas unu el la plej belaj en la tuta regiono. Unu el plej belaj detaloj estas la rigardo al la valo de la rivero Sava kaj lago de Bled, kiuj troviĝas 1700 metrojn sub la pinto.

La vojo al Stol estas simpla kaj nedanĝera, sed laciga pro granda altecdiferenco, sed tamen, plejmulto da partoprenantoj sukcesis surgrimpri la pinton kaj ĝui la nekredible belan veteron, la tuttagan sennuban ĉielon kun forta suno kaj apenaŭ iom da vento, kio estas ne tre ofte spertebla afero en montojn kun tia alteco.


La lastan tagon de la aranĝo oni uzis por la vizito al konata turisma urbeto Bled kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kie la plej konata vidindaĵo estas la samnoma lago tuj apud la urbo. Tute diferenca sed same bela estas la

kanjoneto Vintgar, tra kiu gvidas la vojo kun multaj lignaj pontoj. Bedaurinde, la fino de la aranĝo por ĉiuj venis tro rapide... sed, ja, tiuj tagoj en la komenco de oktobro ne venigis nur la finon de la aranĝo, sed ankaŭ la finon de la longa kaj varmega kvazaŭsomerana vetero. Nur kvin tagojn post la sunumado super 2000 metroj, surmonte falis la unua neĝo kaj blankigis la tutan montaron!

Fine, jen kelkaj vortoj pri la nuna stato de la aranĝo. Post 22 jaroj da okazado en mezeŭropa regiono (Aŭstrio, Slovenio kaj Kroatio) ĝi atingis stabilan partoprenantaron inter 25 kaj 35 esperantistoj, kiuj ŝatas la naturon kaj montojn, kiuj povas preni liberan semajnfinojn fine de septembro kaj havas sufiĉe da mono (la aranĝo ne estas tre multekosta) por veni al MKR. Tamen, videblas la neceso por certaj ŝanĝoj. La plej interesaj montoj kaj la plej taŭgaj montkabanoj jam "elĉerpiĝis" kaj ne aperas novaj partoprenantoj. Speciale mankas junaj interesigantoj. Kelkaj paŝoj jam estis faritaj por ŝanĝi la aferojn: pasintjara la MKR okazis denove en Aŭstrio (kun loka organizanto anstataŭ la konata kroata trikapa teamo) kaj la ĉi-jare MKR estis prezentita per la fama "Facebook", kiu ĉi-momente estas la plej bona maniero por informi gejunulojn. Sed, evidentiĝis, ke nenio vere multe ŝanĝiĝis. Post la aŭstra MKR neniu ne-kroato emis transpreni la organizadon por daŭrigi la ŝanĝdirekton kaj la aranĝo denove revenis al la konata organizanto kaj Slovenio. Spite al "Facebook"-informado neniu MKR-novulo aperis. Do, la demando kion fari por vigligi la MKR-on daŭre restas nerispondita. Ĉe eblaj novaj organizantoj mankas entuziasmo kaj, ŝajne, la mezeŭropaj esperantistoj ne tre favoras la ideon kunigi la internacian Esperanto-etoson kun la umado en la naturo. Speciale mi ŝatus mencii la malintereson en Slovenio (kie la aranĝo ja jam okazis plurfoje), kie preskaŭ neniu el lokaj esperantistoj venis al MKR dum lastaj jaroj kaj lokaj Esperanto-organizoj ne emis kunlabori en ajna maniero. En Italio (kie MKR estas regule anoncita), nur du personoj malregule venas, kaj en Aŭstrio, kiu ja estas tradicie montmigranta lando, ene de la ne tre forta nacia Esperanto-movado, ne estas multe da intereso por la kunlaboro.

La persona opinio de le aŭtoro estas, ke tia situacio okazas parte pro la ĝenerala malentuziasmiĝo en la mondo kaj sekve en Esperantujo, kaj parte pro ne vere granda intereso en la Esperanto-movado pri naturo kaj rilataj aferoj.

La venonta jaro donas la novan eblecon revigligi la aranĝon, sed, se ne aperos nova vigleco ene de MKR, povus okazi ke la aranĝo iam, en ne tre fora estonteco, ne plu ekzistos, almenaŭ ne en la mezeŭropa regiono.



IMPRESOJ EL LA ESPERANTO-URBO

Small Grbo

Komence de aŭgusto atingis min afabla kaj honoriga invito de la geĉefoj Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy el Interkultura Centro Herzberg (ICH) en Germanio, por esti ilia speciala gasto komence de oktobro. Temis pri Internacia simpozio pri Esperanto-muzeoj, bibliotekoj, arkivoj.


Post la tuttaga libera promenado en la urbo, sabaton okazis prelegoj kaj prezentoj. Detlev Blanke prelegis pri "Biblioteko kaj arkivo de familio Blanke kun aparta konsidero de la kontraktaj rilatoj al la Federacia Arkivo de Germanio"; Ela Maria Karczewska el Bjalistoko pri "La Podlahia biblioteko" (Ŝi ankaŭ invitis nin partopreni al la literatura konkurso "Se vi serĉas amikojn, lernu Esperanton!") kaj Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy pri "La biblioteko kaj gazetarkivo de ICH". Ili prezentis ankaŭ kelkajn Esperanto-muzeojn, bibliotekojn kaj kultur-centrojn.

Koreanino (kromnomita Amira) prezentis la temon "Seŭla Esperanto-Kulturdomo kaj la instru-agado". Hungarino Anikó Nemes sendis kaj Zsófia Kóródy prezentis la temon "Novajoj el la Fajszikolektaĵo el Budapeŝto"; dum mi parolis pri mia propra biblioteko kaj prezentis la filmon kun Esperanto-muziko "Miaj Esperanto-muzeoj kaj Esperantogardeno". Stefan MacGill prelegis pri "ILEI kaj la 'Projekto Esperanto 125'"; François Lo Jacomo pri "60-jara Greziljono: novaj projektoj de malnova kultur-centro". Oni parolis ankaŭ pri "Radio Muzaiko", terminologia normigado, zorgobotoj, partnereco kaj kunlaboro inter ĝemelurboj Herzberg (DE) kaj Góra (PL). Paralele okazis Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia (TORPED-o). Cseh-metodan kurson gvidis Sabine Trenner.

Ni ne nur 'kunsidadis', sed ankaŭ: komune tagmanĝis kaj vespermanĝis, kantadis kaj

lernis kanti, iuj aktorin, deklamis ... Ni vizitadis Esperanto-centron kaj trarigardadis ĝian Esperanto-trezoron, ekskursis al proksima universitata urbo Göttingen. Resume, bela pejzaĝo, interesa historio, Esperanto-etosol!

La ĉarma urbeto Herzberg am Harz, kun proksimume 15.000 loĝantoj, antaŭ kvin jaroj oficiale ricevis la kromnomon "Esperanto Stadt", "La Esperanto-urbo". Ĉi tien translokiĝis kaj vivas: naturmetoda kuracisto Harald Schicke (en lia Esperanto-kafejo ni babiladis kaj gustumis bongustajn kaj sanajn verdan 'Esperanto-trinkaĵojn' kaj 'Esperanto-kukon', kiujn faras koreanino, Esperanton parolanta kaj tie vivanta. En Herzberg vivas polino Ewa Kukielka kun la 10-jara filino Estera kiu jam bone parolas Esperanton, sed ankaŭ la polan, germanan kaj anglan, hungarino Zsófia Kóródy (la dekstra mano de Petro Zilvar kaj ŝajne motoro de la tiea Esperanto-centro). Iranano Amir aĉetis hotelon, ktp. Impresis min, ke ne nur sur la sidejo de ICH, sed ankaŭ sur la urbodomo en la ĉefa strato (promenejo) flirtas nia flago, kaj ke la urbestro Walter, jam 12 jarojn okupanta la urbestran funkcion, lernas kaj eĉ parolas Esperanton. Li akceptis nin en la Kavalira salono de la pli ol 900-jara kastelo de Welf-familio (Welfen-schloss) kaj mi donacis al li mian libron "Mi



estas esperantisto" kaj lumdiskon en Esperanto pri Sarajevo, miaj iamaj Esperanto-kluboj, mia Esperanto-muzeo. En la kastelo, krom kelkajn aliajn muzeetojn, ni vidis ankaŭ la Esperanto-muzeon. Esperanton ni renkontis ankaŭ en la urba biblioteko, sur tabuloj ĉefstrate, vojmontriloj al ICH, sur la Esperanto-urboplano, en Esperantlingvaj turismaj broŝuroj... Esperanto-kursoj estas gvidataj en tri urbaj

lernejoj. Mi vizitis unu el ili, kie mi gvidis lingvan ludon. Ĉe Zamenhof-monumento (farita en Ĉinio), ni faris komunan foton, sed mi vizitis ĝin ankaŭ sola por mediti en la apuda parketo. Inter multnombraj ZEO-j estas ankaŭ iom nekutima monumento al la germana Esperanto-pioniro.

Ĉi tiu ĉarma urbeto ĉe la pordo de Nacia Parko Harz, kun sia ĉirkaŭaĵo estas perfekta ripozloko. Kun grupeto, kaj poste

sola, mi vagadis tra arbaro ĝis la akvofaloj (natūra kaj artefarita), rondiris ĉirkaŭ la Jues-lago...

Se vi deziras viziti ICH/Germanan-Esperanto-Centron en Grubenhagenstrasse 6 (tie tutjare okazas io), kaj Herzberg am Harz - La Esperanto-urbon, meze de Germanio (tipa germana mezepoka urbo kun belega naturo, la unua Esperanto-urbo de la mondo), turniĝu al: esperantozentrum@web.de

PETRINJA REVENAS AL ESPERANTUJO

Sreĉko Radulović

Komence de la 1960-aj jaroj Petrinja estis unu el la plej konataj Esperantaj lokoj en Kroatio. Kvankam ĝi neniam havis societon, per la laboro de sindonema instruistino Marija Horžinek, en la tiea elementa lernejo dum jardekoj la lernantoj havis Esperanton kiel elekteblan studobjekton. Dum tiuj jardekoj centoj da infanoj konatiĝis kun la Internacia Lingvo, kaj pluraj el ili restis ankaŭ aktivaj en la tiutempa movado.

La situacio draste ŝanĝiĝis per pensiigo de Marija Horžinek, kaj la Patrolanda milito ankoraŭ pli malbonigis la

situation. Petrinja estis la urbo kun tre miksitaj loĝantaro, ĉefe serba kaj kroata. Dum la militaj jaroj en ĝi okazadis tragikaj bataloj, kaj post la milito ŝanĝiĝis la strukturo de la loĝantaro. Formigris iamaj lokaj serboj, sed almiĝis la loĝantaro el Bosnio kaj aliaj regionoj.

Per la klopodoj de Sreĉko Radulović, la prezidanto de Esperanto-societo en Sisak, formiĝis la iniciata rondo en Hrastovička gora, pri kio ni skribis pasintnumere. Post tio estis formita la iniciata komitato por fondo de la societo, kiu konistas el: Irena Sigur (prezidantino), Marica

Lovreković (vicprezidantino) kaj la membroj Josip Štajcer, Sreĉko Radulović kaj Slavko Santek.

Post la fondo de la Iniciata komitato, estis lanĉita la unua Esperanto-kurso. Helpataj de lokaj lernantoj, oni distribuis ĉirkaŭ 3000 flugfoliojn pri la kurso, reklamis ĝin per afiŝoj kaj en la loka gazeto kaj helpe de radio-stacio Petrinja.

Estis preparita speciala prelego titolita "Malkovru la Internacian Lingvon Esperanto" (prelegis Radenko Milošević kaj Josip Pleadin). Post la prelego la ĉeestintoj povis aliĝi al la komenciĝonta kurso. Formiĝis la grupo de 10 kursanoj, kaj aldone 2 personoj elektis korespondan kurson. La kurson dum kvin semajnfinoj (sabate kaj dimanĉe) gvidas Josip Pleadin en "Hrvatski dom" (Popola malferma universitato). Temas pri intensa kurso (po du horojn tage), kaj estas uzata la kroata eldono de la lernolibro de Stano Marček "Esperanto - izravna metoda" eldonita de UZE.

Meze de decembro estas planata ekzameno por ĉiuj kursfinantoj. Dum decembro oni planas ankaŭ fondi la unuan Esperanto-societon en Petrinja. Ĝi devus fariĝi la centro el kiu Esperanto disvastiĝos en la urbo kaj tra la ĉirkaŭa regiono. Per tio ankaŭ Petrinja revenus en la sinon de Esperantujo, kien ĝi jam delonge apartenis pro la laboro de la vigla instruistino Marija Horžinek. Ĉefe pro ŝiaj meritoj Esperanto estas ankoraŭ konata socia faktoro en la urbo.



JOSIP RUĐER BOŠKOVIĆ

 Radenko Milošević

Enkondukaj vortoj

Ni komencu per kelkaj elkoraj plorgutoj, ĉar malgraŭ la anonco de UNESKO, kaj iatia reeĥo en nia hejmlando, iom tro silente kaj nerimarkite preterpasas la jubileo de la kroata kaj monda eminentulo Josip Ruder Bošković. Pasas la 300-a datreveno post la naskiĝo de unu el la plej grandaj kroataj kaj mondaj geniuloj. Preskaŭ ne ekzistas scienca kaj arta sfero, en kiu li ne lasis sian spuron. En la verkaro kiu konsistas el 75 grandaj volumoj plenaj troviĝas liaj kontribuoj pri matematiko, astronomio, fiziko, meĥaniko, optiko, filozofio kaj literaturo. Pri Bošković, kaj la Nobelpremiito Werner von Heisenberg diris: "Li konstruis la fundamentojn de la moderna kompreno de materia strukturo!", kaj la fama filozofo Friedrich Nietzsche opiniis pri lia teorio, ke ĝi estas "la plej granda triumfo super sentumoj, kiuj ĝis nun super atingitaj estis". Ni aldonu ion signifan por ni esperantistoj. Tiutempe la latina lingvo servis kiel kroata Esperanto kaj la fenestro per kiu kroataj sciencistoj kaj verkistoj eniris Eŭropon en la 16-a jarcento.

Multaj elstaraj kaj famaj fizikistoj kiel Maxwell, lordo Calvin kaj J. J. Thompson, rekte ligis siajn atingojn alla teorio de Bošković, kaj pro tio li kaj lia verkaro ankoraŭ ĉeestas en la moderna fiziko. Malgraŭ liaj multaj malkovroj, sciencaj atingoj kaj filozofiaj pensoj, li rigardis la homajn verkojn kiel kadukecajn kaj nedaŭraj, kion li esprimis per la vortoj: "Kiam mi vidas ŝtonajn monumentojn ruinigitajn, kun forviŝitaj literoj sur ili, tiam mi tiam mi demandas min kio okazos kun tio kion mi faras." Estas menciende, ke la grandega sciencisto sentis ĉiam la plej grandan ĝuon helpante al siaj



parencoj kaj al povruloj.

Josip Ruder Bošković naskiĝis en Dubrovnik, la urbo kies patrono estas Sankta Vlaho. La urbo Dubrovnik donis aron da kroataj famaj sciencistoj, verkistoj kaj poetoj. Apud Bošković, en tiu ĝirlando kiel brilaj perloj elstaras la fizikisto kaj matematikisto Marin Getaldić, la verkisto kaj komediografo Marin Držić, la glorplena verkisto kaj lingvisto Ivan Gundulić, kaj la granduloj Šiško Menčetić, Džore Držić, Mavro Vetranović kaj aliaj. Inter ili sendube elstaras Josip Ruder Bošković, kies monda kaj nacia gloroj ne malheliĝis eĉ tricent jarojn post lia naskiĝo.

Bošković, laŭ la dubrovnika parolmaniero Rude, naskiĝis la 26-an de majo 1711 en okinfana familio. Post li naskiĝis lia fratino Anica, kies rolo en la posta vivo de Ruder estis tre signifplena. Lia familio estis edukata en la atmosfero de severeco kaj ordo, konforme al la jezuita moralo.


La okupoj de tiutempa junularo en Dubrovnik estis vizitado de lernejoj kaj preĝejoj kaj kurado ĉirkaŭ la kolono de Orlando. Bizara estas la ekscio ke Bošković, ludinta dum la tertremo, preskaŭ pereis kiam sur lin falis la ŝtona kapo de la statuo de sankta

Vlaho. Samkiel la plej granda parto de infanoj, ankaŭ li vizitadis la jezuitan lernejon kie, li elstaris kiel laborema kaj intuicia junulo. En la aĝo de 14 jaroj li foriris al la fama Collegium Romanomum (=Roma kolegio). Post la unuaj kvin preparaj jaroj, li vere transiris al la Roma kolegio kie li studis filozofion kaj matematikon. Akirinte la unuan gradon de studado, Bošković komencis labori en la Jezuita kolegio. Rapide venis invito el Dubrovnik, ke li revenu al sia urbo, sed li tamen restis en Italio. Tiam komenciĝis liaj daŭraj kontaktoj kun liaj gefratoj, kaj speciale kun la fratino Anica.

Bošković, havinte multflankajn interesojn daŭrigis labori en matematiko, astronomio kaj literaturo. Teologion li komencis studi en la jaro 1738 kaj tamen restis al li iom da tempo por studi kometojn. Kiel ĉiu jezuito-komencanto Bošković skribis anonime siajn "Disertaciojn", sed post iom da tempo, en 1736, li publikias siajn verkojn sub al titolo "Pri sunmakuloj". Liaj rimarkitaj diskutoj tre rapide speguligis liajn grandajn ideojn pri senlimeco, relativeco, natura filozofio. Finfine post prelegado pri matematiko, fiziko, meĥaniko kaj astronomio, li sukcese libertempe en sia naskiĝurbo Dubrovnik en la jaro 1747. En 1754 li publikigis tre valoran verkon "Elementoj de universala matematiko" kaj "Elementoj de geometrio".

Post iom da tempo, ĉar la jezuitoj jam estis malfavorataj, li foriris al Parizo. Alta kaj bonaspekta, kun kono de tre sukcesaj latinaj epigramoj, li ofte restadis en rondoj de belaj virinoj. Kiam li deprenis la jezuitan veston, li vojaĝis al Anglio kaj Konstantinopolo, sed tie li malsaniĝis. Ĉirkaŭis eĉ onidiroj ke li mortis. Revenite Italion li prelegis matematikon en

Milano kaj samtempe konstruis observatorion en Brero. Malfeliĉo kaj envio akompanis lin, kaj post la reveno, per siaj kontaktoj li helpadis al Dubrovnik resti neŭtrala en la rusa-turka milito. Diversmaniere li helpadis al homoj en sia naskiĝurbo, interalie per nutraĵoj. Jam korpe kaj anime elĉerpita, li intencis helpi al sia fratiĉo Anica, kiu restis la lasta vivanta familiano. Lia menso malrapide estingiĝis, kaj li mortis la 13-an de februaro 1878 pro pulmokomplikaĵoj. En Dubrovnik estis proklamita tago de nacia funebro.



Teorio de natura filozofio

Por ke ni ne tro ĝenu la legontaron per tiel komplika enhavo kiel la fundamenta verko de Bošković "Teorio de natura filozofio", ni priskribos nur kelkajn fizikajn esprimojn kaj leĝojn.

Jam en la enkonduka "Dediĉa Epistolo" en la unua eldono de la verko, Bošković skribis, ke "tiu ĉi libro signifiĝas estas, sed la enhavo kiun ĝi entenas, ne estas signifiĝas". Plue li skribis, "ke en la libro estas nova kategorio de la kompleta natura filozofio kiu estas malsama al la ĝisnunaj starpunktoj kaj opinioj".

En ĝi "estas enkonstruitaj je stranga maniero kaj hazarde kunligitaj la ĉefaj nuntempaj teorioj, ekzemple la teorio de simplaj kaj neentenditaj elementoj de Leibnitz aŭ la fortoj de Newton, kiuj ĉe iuj distancoj produktas reciprokan alproksimiĝon kaj ĉe aliaj distancoj malproksimiĝon, kaj tion oni nomigas atrakcio kaj repulso". Tiu enkonduka teksto signifas akordigon kaj sintezigon de la doktrinoj de Leibnitz kaj Newton, kaj ĉe la enprofundiĝon en la fundamenton de la teorio de Bošković oni devas orientiĝi al la ceteraj fizikistoj, ekzemple al Galileo kaj Deskarto.

La grandioza verko: "Theoria philosophiæ naturalis redacta ad unicam legem virium in natura existentium" (=Teorio de natura filozofio) de Ruder Bošković donis esencajn kaj radikajn fundamentojn por t.n. "teorio de atomoj" kaj al ĝi ligiĝas la mondfama "atom-modelo" de la nobelpremiito Niels Bohr. En la verko Bošković klarigas sian starpunkton, ke ĉio estas materio kaj moviĝo". Laŭ li, la materio konsistas el samaj faktoroj, sed diversaj leĝoj faras ĝin diversa. La

teorio de Bošković havas la bazon en la ideo pri "seninterrompaj ŝanĝoj". Tiel la demando pri hazarda kunpuŝiĝo de fortoj en la naturo malfermis la bazon por la ekscio de Bošković por percepti la strukturon de materio por kompreni kiel funkcias la universo.

Bošković enkondukis la leĝon de fortoj, kiuj estas refleksiĝas ĉe malgrandaj elektronaj distancoj, kaj atrakciaj ĉe grandaj distancoj. Ŝanĝo de atrakcia al repulsa forto kaj inverse estas nomita la kurbo de Bošković. La kurbo de Bošković priskribas lian starpunkton, ke atomo estas la centra punkto ĉirkaŭ kiu disvastiĝas nuboj de atrakci-repulsaj fortoj. Al tiu ĉi leĝo poste ligiĝis Michael Faraday kaj disvolvis la nunan esprimon de kampoj.

Fontoj:

- (Budak, Neven): Croatica (Hrvatski udio u svjetskoj baŝtini). Zagreb, 2007.
- Bošković, Josip Ruder: Teoria prirode filozofije. Zagreb, 1974.
- Dadić, Žarko: Ruder Bošković (kroate kaj angle). Zagreb, 1987.
- (**): Hrvatski biografiki leksikon (Bj - C) Zagreb, 1989.

GVOZDEN SREDIĆ (1935-2011)

✍ Dimitrije Janičić



La 9-an de oktobro en Beogrado forpasis Gvozden Sredić, konata inter la fervojistoj esperantistoj sub la pseŭdonimo Fero. Magistro de ekonomiaj sciencoj, diplomita ekonomiisto, verkisto, vortaristo, tradukanto kaj preleganto. Duonjarcento da lia aktiveco naskis dudekon da libroj kaj broŝuroj. Inter ili apartan lokon havas lia lernolibro "Esperanto por fervojistoj" eldonita en ses eldonoj kaj en ok miloj da ekzempleroj, kaj ses diversaj fakaj vortaroj. Organizado de du kongresoj, aŭtoro de dekdek fakaj prelegoj, partopreninto de multaj renkontiĝoj, portanto de ora insigno de Internacia asocio

de esperantistoj fervojistoj, honora membro de IFEF, estas nur kelkaj el multnombraj liaj aktivecoj. La lasta numero de "Jugoslavia fervojisto" el la jaro 2002 sub la titolo "Eta kronologio de unu poresperanta vivo" estis dediĉita al duona jarcento de lia aktiveco.



Kroatio LA GUSTOJ DE MIA INFANAĜO

Mi ĉiam ŝatis rigardi la fotojn kiuj prezentas ravajn pejzaĝojn, kaj mi revis eĉ por momento viziti tiujn magiajn lokojn kaj ĝui iliajn vidaĵojn. Sur nia planedo ekzistas multaj vidindaj lokoj, kiujn valoras viziti kaj observante ilin kredi je mirakloj....
En la vivo estas nur belaj momentoj kiajn en sia kanto priskribis Ryszard Riedl. Ne gravas ĉu triviale sonas tiuj vortoj. Ni klopodu ensorbi kiel eble pli da tiaj momentoj. Mi mem tiajn neforgeseblajn kaj belegajn momentojn travivis en Kroatio, kiun ĉi-jare mi vizitis. Ĝi estas la lando kun preskaŭ eksterteraj pejzaĝoj kaj nekutime interesaj lokoj kiuj ebligas senperan interrilatadon kun la historio kaj kun ĝia belega multkilometra bordo ornamita per dissemitaj ĉarmaj insuloj.

Mi loĝis en Pag, la urbo situanta sur la samnoma insulo,

Malgosia Komarnicka



en la reĝlando de naturkvalita ŝafa fromaĝo (*paški sir*), la loka vino (*žutica*) kaj mane faritaj puntoj (*paška čipka*). Kiam mi atingis la insulon, mi ne povis fortiri la okulojn de la belega "luneca" pejzaĝo kiu ĉirkaŭis min, de la disŝiritaj blankkoloraj kalkaj rokoj kiujn malabunde prikreskis plantoj, de la mirakle blua ĉielo, kaj de la maro en diversaj turkisaj nuancoj.

Kiu almenaŭ unu fojon troviĝis ĉe la maro, tiu komprenas ĝian magian forton kaj precipe ĉi tie, ĉar la mara akvo en Kroatio estas kristale travidebla.... Videblas la marfundo eĉ en profundo de dekelke da metroj, kaj la impresoj dum observado de la subakva mondo estas vere nekutimaj. Sendepende pri tagparto, mi admiris ankaŭ la

belecon de apudmaraj golfetoj kaj sovaĝaj strandoj, troveblaj tra la tuta insulo.

Kroatio estas la lando kiu havas ne nur la pitoreskan marbordon, sed ankaŭ la lando kun variaj aliregionaj pejzaĝoj, volvitaj per mistero de grandiozaj historiaj restaĵoj, ĉarmaj urboj kaj urbetoj, kaj la lando de bongustega manĝaĵo. Pri tio mi konvinkiĝis ĝuste en Kroatio, vizitinte la Nacian parkon Krka, kie mi rememoris la gustojn de mia infanaĝo gustuminte en la privata gastejeto *Seosko domaĉinstvo Pletikosa* apetigitan panon, kiun la dommastro servis al ni kun sekigita kaj fumajita ŝinko nomata *pršut*, dalmatia ŝafa fromaĝo kaj tomatoj. Jam delonge mi ne havis la okazon aĉeti tiel



bongustan panon, kiu rememorigis min pri la belega kaj senzorga infanaĝo. En la insulo Pag, en la restoracio *Na tale*, mi rekonis alian guston de mia infanaĝo, manĝinte la plej popularan kroatan deserton *palačinka*. Ĝi estas patkuko kun konfitajo, fandita ĉokolado kaj tranĉitaj juglandnuksoj, kaj ĝia gusto estis identa al la patkukoj kiujn dum mia infanaĝo por mi preparadis mia avino.

La kroata kuirarto estas tre varia, konsistanta el diversaj gustoj kaj aromoj. La manĝaĵojn oni preparas el la plej freŝaj ingrediencoj: legomoj, fiŝoj kaj viandoj, kaj manĝas en surbordaj restoracioj kun malferma vidaĵo al la maro.



per romantika etoso, kiu donas al ĝi esceptan karakteron. Etendiĝantaj ĉirkaŭ la urbo, la pitoreskaj pejzaĝoj ebligas admiri ne nur la antikvaĵojn, sed ankaŭ belecon de la naturo.

Kroatio estas ankaŭ la lando de perfektaj aŭtovojoj, de nekutime gastemaj, amikaj kaj ridantaj homoj, kaj de la kanzonoj kiuj je la unua momento katenas la koron. Ĉi tie dum jarcentoj interpuŝigis influoj de multaj kulturoj, pro kio ĉiupaŝe oni sentas bloveton de la historio, kvazaŭ oni vizitus samtempe kelkajn lokojn en la mondo.

Mi estas konvinkita, ke ĉiu kiu foje vizitis Kroation, revenos tien denove. Mi jam certas, ke mi iam revizitos tiun landon, la landon kiu rememorigis al mi la gustojn de mia infanaĝo...



En Kroatio ĉiu nacia parko estas neripetebla travivaĵo kiu elvokas admiron pro la grandioze interplektita kunekzistado de la naturo kaj homo. Skradinski buk, la akvofalo en la Nacia parko Krka, estas unu el la plej belaj tiaj lokoj, kaj Lagoj de Plitvice ravas per preskaŭ nekredindaj pejzaĝoj, post kies vido la vizitanto ne nur malstreĉiĝas, sed akumulas fortojn per sekvaj monatoj.

Vizitinte la centran Dalmation mi speciale admiris la ĉarman urbon Ŝibenik, en kiu mi volante ekloĝus ... Tiu mirakla urbo kun la antikva historia arkitekturo, mallarĝaj stratetoj, agrablaj vojetoj, blankaj domoj kun fenestroŝirmiloj kaj ruĝaj tegmentoj, estas envolvita



TUTMONDAJ DEFIOJ DE LA KLIMATOŜANĜIĜO (2)

✍ Adrienne Pásztor

Originala Esperantlingva eseo

HONORA MENCIO en Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, 2011

9. LA 11- KAJ 22-JARAJ CIKLOJ DE SUNAKTIVIADO

Zsolt Leitner, amatora astronomo en Miskolc, donis la sekvan opinion al la temo: Fine de marto de ĉi tiu jaro (*rim. de la aŭtoro: 2010!*) mi havis bonŝancon aŭskulti en la Gimnazio de Diósgyőr, prelegon titolitan "Sunaktiveco kaj klimatoŝanĝiĝoj" de doktorino Katalin Oláh, prezidantino de la Astronomia kaj Spacfizika Komisiono de Hungara Scienca Akademio (MTA), astronomo de la "Miklós Konkoly Thege" Astronomia Esplorinstituto de MTA. En tiu prelego la preleganto alvokis atenton je tre interesa afero: "ligo estas demonstrebla inter la 11- kaj 22-jaraj Sun-cikloj (minimumoj kaj maksimumoj) kaj la klimatoŝanĝiĝoj de la Tero. Laŭ tio, kiu procezo nun en nia vetero sperteblas, ne estas ununura evento. Tiuj ĉi ŝanĝiĝoj okazis jam ne nur antaŭ kelkcentmiloj da jaroj, sed ankaŭ antaŭ kelkaj dekmiloj, aŭ kelkcentoj da jaroj. La sunaktivado ankaŭ ĉi-maniere efikas al nia Tero, plie al nia klimato.

La teran klimaton influas la vulkanoj, la nuboj estantaj en la stratosfero kaj la oceanaj fluoj kaj ankaŭ ilia temperaturo. La vulkanoj enigis sulfurdioksidon en la stratosferon, kio tie kreas tavolon konsistantan el sulfurdioksidaj gutoj. Al la klimato efikas ankoraŭ la partikloj elflugantaj de Suno (suna vento) kaj ankaŭ la kosma radiado. Se la sunvento pli grandas, ankaŭ la protekto estas pli forta. Je pli

malalta sunagado plura kosma radiado alvenas. La kosma radiado estigas nubogermojn el akvovaporo kaj sulfura acido."

10. LA TEORIO DE MILANKOVIĆ-BACSÁK

"György Bacsák (naskiĝis en Pozsony, la 5-an de junio 1870 – mortis en Budapeŝto, la 4-an de marto 1970) jura konsilisto, astronomo, geologo, doktoro de la Tero- kaj mineralogiaj sciencoj (1954), konatiĝis en Pozsony (nun Bratislava) kun la ĉiela mekaniko. Aŭtodidakte li lernis astronomion. Per granda matematika scio kaj vast-horizonta paleoklimatologia vidmaniero li klopodis rekonii kaj klarigi la movadleĝojn de la ĉiela mekaniko kaj la interrilatojn de la plejstocenaj glaciepokoj. Tiujn ĉi konojn havante, li interpretis la elformiĝon kaj la tempan defluon de la plejstocena epoko kaj glaciepokan teorion de la serba klimatologo Milutin Milanković (1898-1945), kiu el leĝoj de ŝanĝiĝoj de la orbit-elementoj de Tero klarigis per grafika prilaboro de la astronomiaj datumoj la estiĝon de la glaciepokoj. Tiu teorio konsideras la Suno-Tero distancon, la ŝanceliĝon (precesion) de la rotaciakso de Tero, kaj la rotacioaksan angulon, kiuj determinas la kvanton de la surteriĝanta sunradiado. György Bacsák pruvis kaj kompletigis la teorion de Milanković, laŭ kiu la malnormala spaca pozicio de la Tero kreas taŭgajn cirkonstancojn por la estiĝo kaj ripetigo de glaciigoj.

La Milanković-Bacsák

teorio estis la unua unusence formigita glaciepok-teorio, kiun la evoluo dum multaj jardekoj pasintaj deponis ĝia naskiĝo ne malkonfirmis, sed nur ampleksigis."

Laŭ alia teorio "kaze de la glaciepokoj pluraj faktoroj povis elvoki la varmiĝon. Balanciĝo de la rivoluakso de Tero, suneksplozoj, vulkanismo povis esti la elvokaj kaŭzoj, sed la esenco estas, ke la eventoj tamen ĉiuokaze kune okazis kun la ŝanĝiĝo de la koncentriteco de la karbondioksido.

11. KARDINALA ROLO DE LA CIRKULADO DE KARBONO

1. La karboncirkulado en la verdaj kreskaĵoj okazas pere de la fotosintezaj procezoj.

2. Je solviĝo de karbondioksido en la akvo estiĝas karbonata acido (H_2CO_3), sekvas la acidiĝo de marakvo, pH malpliigo. Ankaŭ tio efikas malfavore al la vivularo! La akvo je alta temperaturo ĉiam malpli da gaso povas ligi.

3. La karbondioksidon diversprocente povas ligi la C3-aj (mezvarmaj zonaj) plantoj, kaj la C4-aj (tropikaj) plantoj! Al la specio-rearanĝiĝo pro eventuala varmiĝo aŭ malvarmiĝo, plurcentoj da jaroj estas bezonataj!

4. Kaze de la C3-aj plantoj pere de altiĝo de la CO_2 koncentriteco kreskos la kapacitopor ligi la CO_2 -n, sed dume la plantoj eligas varmon, do grandigas la temperaturon de sia ĉirkaŭaĵo. Ni ne forgesu, ke dume

la karbondioksidnivele stagnos, eĉ ankoraŭ malpliigos.

Jes ja, sed far leviĝo de la temperaturo la fotosintezagado de plantoj atingas ian maksimumon, ĉar en alta temperaturo, plie ĉe grandaj temperaturŝanceliĝoj, ili jam ne povas ligi la CO₂ gason, sed ili amase pereos pro la aliĝintaj vetercirkonstancoj, la CO₂ koncentriteco subite altiĝos, ĝis aranĝigas la plantaro de la planedo al konvenan produktivecon donanta nivelo (C4 plantoj). La procezo progresas same ankaŭ retrodirekte, do post la efiko de malvarmiĝo restas ankoraŭ multe da CO₂ pro la pereado de plantoj. Poste la C3-j rearanĝiĝo (kelkcent jaroj) la CO₂ nivelo subite malpliigas.

12. DEFLANKIĜO

La degelo de Antarkto je interesa maniero malfruis ĝuste pro la ozontavola maldikiĝo. La malrapide regeneriĝinta ozontavolo ne influas plu la procezojn en direkton de la malvarmiĝo (pro la malaperanta ozono la forcejefiko ne povis atingi tian gradon, kiel okazis sur Antarkto). Tiel la rapidiĝanta degelo ene de kelkaj jaroj prezentigos sur ambaŭ polusoj... (Prelego "Pri la forcejefikaj gasoj" de Csongor Horváth redaktoro en la repaĝo de Klimato-rondo de urbo Tatabánya): "Kvankam ŝajnas, ke pri la nordaj kaj sudaj glacikovriloj de la Tero ĝuste kontrastaj aferoj okazas, ambaŭ simptomoj estas sekvoj de la homa agado" – anoncis John Turner, brita esploristo, okaze de la konferenco aranĝita pri la Internacia Polusa Jaro (IPY) en Oslo. Laŭ li la glacio de Norda poluso degelas de jaro al jaro ĉiam pli kaj pli grandmezure pro la kreskanta karbondioksida koncentriteco en la atmosfero. Sed sur alia parto de la terglobo pro iu pli frua homa agado (la fabrikado de freon-gaso kaj ties eniĝo en nian atmosferon) dikiĝas

la mara glacikovrilo. La glacio degelas ĉiujare pere de ŝanĝiĝo de sezonoj kaj frostiĝas denove ... (Erika Csepe / *nepszava.hu*). Argentinaj ekoloĝoj konkludis, ke ne la alsendado de CO₂ al la aero, sed la ŝanĝiĝoj okazintaj en la Suno, kaj ĝia aktiveco dum la lastaj cent jaroj estas la kialoj de la klimato-ŝanĝiĝo (*eo.wikipedia.org*).

La klimato-ŝanĝiĝo estas tre kompleksa procezo ankaŭ laŭ Zsolt Leitner, la Miskolca amatora astronomo. La teran klimaton multoj efikas, eble eĉ plie, sed ne egalmezure, la naturaj procezoj, la naturaj fenomenoj, ol ni homoj. Sed tio ne signifas, ke ekde nun ni poluciu trankvile nian medion, konstruu mediopoluajn, sanon damaĝantajn fabrikojn kaj dise lasu malpurigajojn, ne okupiĝu pri la mediprotektado. Sed tamen nia pensmaniero klarigas, kial disputas niaepoke ne nur la politikistoj, sed ankaŭ la fakuloj, kiom povas esti kulpigebla la homo pro la nuntempe okazanta klimatoŝanĝiĝo, kaj kiom konsiderebla ĝi estas kiel natura procezo. Pruvi, ke la klimatoŝanĝiĝo plejparte "dankendas" al la homa agado, preskaŭ maleblas, ĉar ne estas tiel. "Sed unuafoje mi certas" – skribis s-ro Zsolt Leitner – "ankaŭ ĉi-terene atendas la Homaron tre multe da laboro. Ni devas esplori, esplori kaj esplori, por pli bone ekkoni nian medion, kaj nin mem."

Degelas la neĝo kaj glacio ankaŭ de la altaj montaroj (Alpoj, Karpatoj, Kilimanĝaro...). La akvoj devenantaj de la degelantaj neĝo kaj glacio de la altaj montaroj provizas per akvo tre multajn industriajn uzinojn. Mi vidis, ekzemple, en la francaj Alpoj, ke okaze de la malpliigo aŭ perdiĝo de la akvokvanto, tiuj teritorioj eble senpopoliĝos. La ruinoj postrestintaj el tre malnovaj tempoj de la forlasitaj setlejoj, bone videblas sur satelitaj fotoj. Laŭ la indikoj de la hungara Vikipedio – la libera reta enciklopedio – "niaepoke la glaciriveroj enhavas la pli grandan

parton de la dolĉa akvorezervo de la Tero, pli grandan ol la Alpoj de Eŭropo. La situacio por elformiĝo de glaĉeroj estas favora tie, kie la teritorio estas super la neĝolimo kaj la plej grandkvanta estas la precipitaĵo."

12. NEĜOLIMO KAJ GLAĈEROJ

La limo de la eterna neĝo estas tiu nivelo de la altaj montaroj, super kiu la atmosfera precipitaĵo falas ĉiam neĝoforme kaj la neĝo neniam degelas. En norda parto de Norvegio tio estas 720 metroj, en Himalajo 5.670 metroj, sed en la Arktiko ĝi samnivele kun la marnivelo.

En 2009 dum vojaĝo farita en Francujo nun mia edzo ankaŭ ni ekskursis al la Mont Blanc, por rigardi la glaciriveron. Kiam la aviadilo flugis kun ni en proksimeco de la plej alta pinto de Mont Blanc, sub ni la nubaro aspektis kvazaŭ senlima neĝkampo. Surprizite ni spertis la 30-an de junio 2009, ke la pinto de la pli ol 4800 metrojn alta Mont Blanc, nude leviĝis al la brile blua somera ĉielo. Ni pensis, ke certe la nivelo de la neĝolimo nun pli supren puŝiĝis, kaj pro tio neĝo ne kovris la pinton. Ĉi tiu neĝolimo en la montarsistemoj de Alpoj kaj en Karpatoj estas 2.750 metroj. Dum la tago de nia ekskurso (la 7-an de julio 2009) tuttage pluvis. Laŭ flankoj de Mont Blanc en dikaj strioj kiel akvofaloj falegis la akvo de la degelantaj neĝo kaj glacio. De tempo al tempo ĉesis la pluvo, kaj tiam ni povis vidi nur ie kaj tie neĝmakulan gigantan monton. De haltejo de la dentrada fervojo de Chamonix, el 2.062-metra alteco de la tiea elvidejo ni rigardis supren al la pinto. Neforgesebla, fascina spektaklo estis ankoraŭ tiel senherbeje la plej alta punkto de la pramasivo. Ni aŭdis, ke multaj famuloj vizitis jam la glaĉeron en Chamonix, por vidi la ĉiam neĝan monton. Inter aliaj vizitis ĝin Goethe en 1797 kaj Aleksandre Dumas en 1832. Pli poste ni eksciis, ke ankaŭ la

fama hungara komponisto Ferenc Liszt estis tie en 1836. Ni aŭdis, ke la tuta longo de la glaĉero Mont Blanc de Chamonix estas 14 kilometroj, ĝia larĝeco 400 metroj, do la glaĉero povis nutri sin kaj povas sinnutri ankaŭ hodiaŭ el granda neĝo- kaj glaciokovrita teritorio. Laŭ onidiroj ĝia vasto kaj dikeco malpliĝas ĉiujare. Ĉirkaŭ la glaciĝro oni povas vidi la bluan koloron de la praaj glacio. Ĝi estas ege densa, pro kio ĝi estas tiom blua anstataŭ blanka aŭ blankeca, ĉar ne ekzistas en ĝi aervezikoj kiuj blankigus ĝin.

La "Musée Alpin" = Muzeo pri Alpoj, ekspozicias memorarojn pri la konkerado de la Alpoj. Kiam en 1867 oni komencis konstrui la elvidejan terason, la laboristoj ankoraŭ pene povis supreniri tien pro la monton dense kovrantaj neĝo kaj glacio. Superhoma laboro estis bezonata por trovi la rokon sub la glacio, por fiksi al ĝi la tenajn ferstangojn de vojlinio de dentrada fervojo. Niatage, sur la monton kondukas jam sennegaj kaj senglaciaj turistvojoj el la urbo situanta ĉe piedoj de la montarego (de urbo Chamonix kiu situas en la orienta parto de Francujo, en la regiono Rhône-Alpes). Ni aŭdis plie, se la degelo progresos samezure, jam nur por 20 jaroj sufiĉos la glacio de la glaĉero. La glaĉersurfacon kovras ŝtonfalajo kaj griza polvo, kaj ties amaso kreskas ĉiujare. Kiu atendas blanka ĉi tiun glaĉeron, al tiu iome seniluziiga estas ĉi vidaĵo, kiu malgraŭ ĉio restas majesta.

Ĉe la glaciomaro "La mer de glace" (kiel la francoj nomas la Mont Blanc-glaĉeron) kaj ankaŭ aliloke en Francujo paroltemo estis la klimatoŝanĝiĝo kaj ties atendeblaj efikoj al la homa kaj besta vivo, al la terkulturado, al la nutraĵproduktado kaj akvokvalito, koncerne la industrion kaj la komercon. Ne ĉiu homo pensas, ke ekskluzive mem la homo kulpas pro la ŝanĝoj. Multaj homoj opinias, ke kvankam kaŭzoj sendependaj de la homo povas roli en la ŝanĝiĝoj, tamen ne permesatas, ke la homo

tiel grandmezure poluciadu la surfacon de nia planedo.

13. LA NATURAJ, KAJ DE LA HOMO KAŪZATAJ AERPOLUCIOJ

Ĉe ekzameno de la stratosfer-konsisto, ni devas ekzameni ankaŭ la planedskalanan naturan aerpoluciadon, konsiderante, ke la polucion de unu regiono al alia portas la vento kaj la precipitaĵo aŭ ĝuste la marakvo. La neorganikaj poluciaĵoj de la aerpoluciado estas ekzemple gasoj devenantaj el la vulkanerupcioj, vaporo, cindro, la saleroj devenantaj kaj ventoportataj el maroj, gasoj kreigiĝantaj dum tempestaj fulmoj, polvo de polvoŝtormoj, krome la kosma polvo. Organikaj faktoroj estas: la fumo kaj polvo devenantaj el forbrulo de plantoj (arbusteaj fajroj, brulo de arbaroj kaj kreskaĵoj de agroj, kampoj, savano-fajroj), polenoj, fungoj, bakterioj, kaj la fumoj kaj fulgoj devenantaj el homaj hejmoj, uzinoj ktp. hejtataj per karbo, tergaso, nafto. Varmegaj vulkanaj gasoj venantaj en la atmosferon, vaporoj kaj temperaturoj de 5.000° C estiĝantaj dum atomeksplodigoj aŭ akcidentoj de atomcentraloj same kontribuas al la varmigo de la atmosfero. Menciinda estas ankaŭ la forbrulo de la ŝtonkarbo kaj lignito, dum kiu procezo same signifa estas la liberiĝo de metano kaj ĝia enatmosferiĝo. Ekzameninte la kaŭzojn, ankaŭ aliaj faktoroj aperas, kiam ni parolas pri protektaj eraroj de nia planedo. Tiuj estas:

La eligoj de damaĝaj materialoj, pro kiuj la aer-konsisto ŝanĝiĝas.

Pro la superkresko de la loĝantaro de Tero ĉiam pli granda teritorio estos enkonstruata, pro kio malplimultiĝas la teritorio por la subfiltriganta precipitaĵakvo.

La grandmezure etendiĝantaj arbarpereigoj en intereso de plivastigo de la kultureblaj agroj. La anstataŭigo de la dehakitaj arboj per nove plantitaj, ne

okazas, aŭ okazas nekonvenmezure.

Kiel eble la plej rapidan solvon bezonas la problemo de nukleaj defalajoj primaraj en la grundopoluciado. La damaĝaj akcesoraj produktaĵoj de la industrio (ekz: la ruĝa ŝlimo dum la aluminio-fabrikado), kaj la plej diversaj kemiaĵoj (ekz. parte aŭ ne tute foruzitaj kolorigaj, lakoj, acidoj), radioefikaj elementoj de telekomunikadaj iloj, malrapide malkombiniĝantaj sintezaj rubaĵoj, vitrorubaĵoj kaj similaj aĵoj.

14. INTERNACIAJ KONTRAKTOJ

Konsiderante la spertojn akiritajn dum la pasintaj dudek jaroj, por organizi la farendaĵojn, fondiĝis la t.n. Klimato-ŝanĝiĝa Interregistara Kontrakto. Antaŭenigi la decidofaro interese de la komuna celo kaj konstato de la respondeco, akordigo de la pluaj taskoj kaj la raportigo pri la faritaj paŝoj. Bedaŭrinde, pluraj landoj rifuzis subskribi la Kontrakton de Kyoto. Inter ili estas ankaŭ Usono.

La Medioscienca Prezidenta Komisiono de la Hungara Scienca Akademio en 2009 faris deklaron pri la klimatoŝanĝiĝo kaj la tiurilataj enlandaj taskoj. Ĉi tiu dokumento estis preparita surbaze de la rezultoj de la internaciaj kaj hungariaj sciencaj esploroj. Kreiĝis Klimato-klubo (www.klimaklub.hu), Verduloj-klubo, Partio de Verduloj. En ties kadroj ankaŭ hungaraj sciencistoj agas kaj prezentas siajn starpunktojn pri la atendeblaj ŝanĝiĝoj ĝis la jaro 2020, pri la utiligo de la disponeblaj energioj, bioenergio, sun- kaj ventoenergio, pri la lukto baziĝanta sur la komuna sinteno kontraŭ la klimatoŝanĝiĝo, iniciatinte inter la gelernantoj la konscian medioamikan kaj medioprotektan vivmanieron. La Klimatoŝanĝiĝa Skiza Kontrakto (Pakto) de Unuiĝintaj Nacioj (angle: FCCC) en Rio de Janeiro estis oficialigita per subskriboj la 13-an de junio 1992. La konfirman dokumenton de la Hungara

Respubliko oni registris ĉe la Generala Sekretario de UN en 1994. Poste oni subskribis la Protokolon de Kyoto. En 2006 jam 188 landoj partoprenis la skizan pakton. En ĝia prilaboro ankaŭ Hungarujo partoprenis kaj aliĝis al la internacia pakto. (Vidu *La Debrecenan Informilon de Medioprotektada Ministerio*, eldonitan en 2003: Internacia kunlaboro por malpliigo de la klimatoŝanĝaj danĝeroj kaj eligadoj de emanoj de la forcejefikaj gasoj: www.ff3.hu/upload/KA-Klima.pdf).

Laŭ la klimatpolitika komisiito de Eŭropa Komisiono, la danĝeron de la klimatoŝanĝigo konfirmas la observoj, laŭ kiuj pro la fosiliaj hejtmaterialaĵoj, kaj la industria agado, aŭ pere de la vulkanismo la en atmosferon eniĝantaj sulfurdioksido kaj nitrata acido precipitiĝas en formo de acidaj pluvoj. La pli frue (en malvarmigaj aparatoj) uzita freongaso venanta en la altan atmosferon, kaŭzis maldikiĝon de la ozontavolo, eksterordinare gravega por la tera vivo. Por solvi tiujn du gravajn problemojn naskiĝis la internaciaj kontraktoj bazitaj sur sciencaj pruvoj, kaj pro iliaj boninfluaĵoj rezultoj la solvado de ambaŭ problemoj nuntempe progresas.

15. NATURO KAJ MEDIOPROTEKTADO

Ekde sia apero sur la planedo, la homo laŭ siaj bezonoj transformis la naturon. Ĉi proceso ne estas haltigebla, ja la homo faras ĉion en intereso de sia komforto kaj agrabligo de sia vivmedio. Sed tamen ni ne devas ignori, ke al la protekto de nia medio apartenas ankaŭ la naturprotektado. La pretendo de la naturprotektado tiam enfokusigas pli forte, kiam la homo estiĝas atestanto de definitiva formorto de tiaj bestoj kaj kreskaĵoj, kiuj ĝis tiam estis integraj partoj de nia vivado, kiu pliriĉiĝis pere de ili.

Por mildigi ĉi tiun procezon, en 1935 estis kreita la unua naturprotektata leĝo, sed tiu laboro progresas malrapide. De tiam realiĝis ankaŭ en Hungarujo diversaj naturprotektaj distriktoj, Naciaj Parkoj, kiuj pro siaj raraj protektindaj bestoj, plantoj aŭ naturformacioj prezentas parton de la Monda Heredaĵo. Ĉi tiuj estas niaregione la teritorio de Nacia Parko de montaro Bükk, en Kelemér la t.n. Pramarĉaj lagoj, la praarbedejo de juniperoj de Nacia Parko en Aggtelek. Sed protekton ĝuas ankaŭ la unikaj plantoj, la raraj arbospecioj kiuj troveblas en arbomuzeoj, botanikaj ĝardenoj, aŭ ili vivas sovaĝe. En nia regiono

Nord-Hungario, menciindaj estas sen pretendo de la senmankeco, la Hungara kolĉiko kaj la Stipo sur rokoj de Boldogkőváralja. En Slovakio, sur flankoj de montaro Granda Fatro, troveblas la orkidospecioj, kaj en la francaj Alpoj la sovaĝe kreskantaj orkidoj kaj azaleoj, kiujn ni povis admiri dum niaj ekskursoj.

16. RESPONDECO KAJ EBLECO

La variaj legitaj kaj aŭskultitaj opinioj firmigis mian opinion, ke la klimatoŝanĝigo ne estas puno de Dio aŭ elprovo de homo de li, nek la alveno de la Apokalipso, sed estas natura procezo de la historio de Tero. La nuna stato povos daŭri eŭ plurajn miljarojn ĝis elformiĝo de la sekva, radikale malsimila klimato. Sed per haltigo aŭ moderigo de nia mediopolucio ni povos havi dum longa tempo la konvenan teran vivmedion por niaj posteuloj.

Jen tio estas la vivkondiĉo kaj respondeco de nia specio sur la Tero. Nia Tero donas nian lulilon, nutraĵon, trinkaĵon, prosperon, la lokon, kien niaj proksimuloj enterigas niajn korpojn, cindrojn. La protekto de nia medio, vivloko por la pluvivo de nia specio nepre bezonatas, kaj tial estas neevitebla.

MALLONGE

Esperanto-societo "Sisak" anoncas, ke la **4-a Esperanto-boatado sur la rivero Kupa** okazos inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto 2012.

Bjelovara esperantista societo estas registrita en la Registro de unuigoj de Respubliko Kroatio la 26-an de oktobro 2011.

La 21-an de oktobro en Križevci estis distribuitaj diplomoj al kursfinintoj de somera Esperanto-lernejo gvidita

de Krunoslav Puškar. Nome de KEL la solenaĵojn en la Urba biblioteko partoprenis Maja Valentić. Oficiala reprezentanto de la Urbo Križevci estis s-ro Mladen Tenodi, estro de la fako pri sociaj aktivecoj.

Ministerio pri turismo de Respubliko Kroatio kontrakte atribuis al la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj okazinta en Bjelovar la sumon de 20.000,00 kunaĵoj. Tio estas la rezulto de traktado inter la LKK kaj la ministro de turismo, s-ro Damir Bajs, kaj de la vizito al la ŝtata sekretario Željko Lenart en la Ministerio pri turismo, kiun

efektivigis la LKK ankoraŭ dum aprilo 2011.

La Esperanto-societo "Mondo paca" el Velika Groica, je iniciato de sia membro, gimnaziano Mario Dilberović, kunlabore kun la loka gimnazio organizis la programon "Vukovar - la heroa urbo tra kroniko de la vivo", omaĝante la viktimojn de Vukovar, okaze de la 20-a datreveno de ĝia milita tragedio. Al Velika Gorica organizite venis gimnazianoj el Vukovar, kaj en la programo parolis politikaj kaj sociaj funkciuloj, kaj la gimnazianoj mem.

ERASMUS – EŬROPA PROGRAMO POR STUDENTA MOVIĜEMO

 *Divo Pulitika*

Verŝajne ne ekzistas studento kiu ne scivolis kiel funkcias la studado alilande. Inter tiuj studentoj, plejmulto havas grandan deziron sperti la vivon en alia universitato. Ĉu ekzistas pli bona maniero por konatiĝi kun aliaj kulturoj, landoj kaj sistemoj, ol mem travivi ilin? Ĉu germanoj vere estas tiom laboremaj, italoj festemaj, britoj malvarmaj? Ĉu ĉiuj hispanoj kuras antaŭ taŭroj kaj ĉu ĉiuj nederlandanoj manĝas strangajn kukojn? Eŭropa Unio konkludis ke, por krei komunan senton inter eŭropanoj, gravas ke ili konatiĝu. Kaj kiu konatiĝas pli facile ol gejunuloj? La produkto de tiu ideo estas ERASMUS – eŭropa programo por studenta moviĝemo.

Mia interesiĝo pri ERASMUS komenciĝis post kiam mi vidis la filmon "Auberge Espagnole". Ĝi estas la filmo pri franca studento kiu devas lerni la hispanan lingvon por trovi laboron, kaj li decidas, ke la plej bona maniero estas iri en Hispanion per ERASMUS. Mi jam lernis la francan dum kelkaj jaroj kaj, laŭ mi, mi progresis tro malrapide. "Do eble estus bone por mi iri Francion kaj esti devigata paroli en la franca?" – mi pensis. Sed ĉu mi kapablos? Ĉu mi perdos unu jaron en la fakulteto? Kiel decidi, kien iri? Post tro da tiaj demandoj mi decidis simple kandidatiĝi kaj poste reguligi ĉion. Post la haosa kaj laciĝega dokumentaĉado (kiu ankaŭ estas tre precize montrita en la filmo, sed mi ne vere kredis, ke oni povas tiom komplikigi la aferon), mi finfine ricevis anoncon dirantan, ke mi estas akceptita! Baldaŭ mi iris al la Universitato Nancy 2.

La urbo Nancy ne estis mia unua ideo. Mi ja volis iri Francion, sed oni povas elekti nur inter la universitatoj kiuj subskribis kontrakton kun

la Universitato de Zagrebo. Do jen, inter ĉiuj urboj kiuj ĝis tiam estis nekonataj por mi, mi elektis Nancion. La kompreno de stulteco de tia elekto frapis min nur kelkajn tagojn antaŭ la ekiro: "Dio mia, mi vere iros al iu urbo pri kiu mi scias nenion, kie mi konas nenion, kaj en la landon kies lingvon mi nur paroletas?!" Sed estis tro malfrue, ĉio jam estis subskribita, mi estis enbusigita kaj la vojaĝo komenciĝis.

Post iom da malfacilaĵoj en Strasburgo, kie mi devis ŝanĝi la trajnon kaj volis aĉeti la bileton en la angla, mi fine atingis Nancion. Kaj jen la fino de miaj zorgoj. Studentoj kiuj laboras kiel akceptantoj de erasmusanoj atendis min, ĉiuj poliglotaĵoj kaj tre bonvenemaj. Post kiam mi aŭdis la nivelon de la lingvoscio de aliaj, mi eĉ pli kalmiĝis. Mi havis helpanton por ĉiuj komencaj malfacilaĵoj: trovi la fakultaton kaj loĝejon, asekurigi la ĉambron, fari konton ĉe la banko ktp. Bonŝance mi venis 2 semajnojn antaŭ la komenco de prelegoj, do mi havis sufiĉe da tempo kaj bonan veteron por bone vidi la urbon. Kaj mi estis tre surprizita: "Kiel eblas ke urbo tiel bela kiel Nancy estas tute nekonata por mi?" Granda ĉefa placo kun orumitaj pordoj kaj granda statuo de Stanisław Leszczyński (iama pola reĝo kiu fariĝis patrono de Loreno – la regiono de Francio kie troviĝas Nancio) estas la plej impresiga detalo de la urbo. La grandeco de la urbo kompareblas al nia Split, kun multaj muzeoj, galerioj, bestogardeno ktp. Alia interesaĵo estas vastaj parkoj, kie ofte okazas kulturaj programoj kaj koncertoj. Post la komencaj tagoj kiujn mi pasis rigardante la urbon, venis la momento por iri al la fakultato.

Tre rapide mi komprenis, ke la studsistemo estas tute malsama ol tiu en

mia fakultato. Ĉe ni normalas havi 5 aŭ 6 grandajn kursojn po semestro, kaj por trapasi la ekzamenojn oni devas ellegi librojn, fari hejmtaskojn ktp. En Nancio normalas havi 12 aŭ 13 kursojn po semestro, sed multe pli facilajn kaj por trapasi la ekzamenojn sufiĉas lerni nur tion kion la profesoroj diktas. Pli facila por francoj, sed por ni ERASMUS-anoj la diktadsistemo estis terura komence. Ni estis kondamnitaj ĉiam kopii de aliaj studentoj kiuj sidis apud ni. Sed normale post la unua horo da diktado, ni perdis la volon, ĉesus skribi kaj atendus la finon. Tamen, post kelkaj semajnoj, ni havis amikojn inter la francoj kiuj senhezite ĉiam sendus la notojn al ni. Jen la plej grava diferenco inter mia erasmusado kaj tiu en la filmo – la francoj estas fakte timigemaj kaj ne facilas fari la unuan kontakton. Sed post la komenca malvarmeco ili iĝas tre bonaj amikoj.

Sufiĉe pri la studado, kiu tamen okupas la plejmulton da tempo por ĉiu erasmusano. La studenta organizo kiu okupiĝas pri internaciaj studentoj (ESN) organizas renkontiĝojn kaj vojaĝojn por ni plurfoje semajne. Oni havas lingvajn kafejojn, kie oni havas ŝancon paroli en diversaj lingvoj (tamen neniu tre interesiĝas pri la kroata), naciajn kuirejojn, kie oni povas gustumi specialaĵojn de diversaj landoj (ĉi-foje ni kuiris rumane!) kaj, plej grave, ekskursojn! Skribante ĉi tiun artikolon mi rememoras ĉiujn lokojn kiujn mi jam vizitis, kaj mi ne povas kredi ke estis tiom da vojaĝoj. Loreno ofertas multajn vidindaĵojn: krom la regiona ĉefurbo Metz, tre tuŝis min la beleco de la naturo. La ĉirkaŭaĵo konsistas el arbaroj, lagoj, riveroj kaj montetoj. Sed, kiel ĉiu vojaĝo al Francio, ĝi ne estus kompleta sen vizito al



Parizo. Parizo! Estis mia unua fojo en tiom granda urbo, kaj mi ege ŝatis ĝin. Ni ja havis tre belan veteron kaj 4 tagojn, sed tamen tio ne sufiĉis por vidi ĉion. Tial ni decidis viziti nur la plej konatajn lokojn, kaj eble reveni denove post la decembraj ekzamenoj. La turo de Eiffel, la muzeo Louvre, Champs Elysées, la Triumfarko, la kastelo Versailles... Ĉiuj grandaj kaj belaj monumentoj apud kiuj ni preterkuris por ĉion vidi. Sed la vera magio de Parizo ne troviĝas en ili. Ĝi troviĝas en kalma nokta boatado sur la rivero Sejno, kafumado kun amikoj en ĉiam malfermitaj kafejoj ĉirkaŭita per ĉiaj diversaj homoj, evitado de miloj da suspektindaj homoj kiuj volas ion vendi, manĝado de krespoj, malkovrado de la sistemo de metroo ktp. Jes, la vojaĝo al Parizo finiĝis tro rapide, sed oni ja diras: "Ĉio kio bonas, daŭras mallonge."

Mia esperantumado en Francio ne estis tre forta, sed jen io ŝanĝiĝas. Mi konatiĝis kun juna esperantisto el suda Francio kiu venis studi en Nancio. Kiel ĉiam en Esperantujo, mi havas amikon kiu havas amikon kiu havas amikon... kaj tiel mi eksciis pri Yoann. Manĝante kun li kaj aliaj amikoj en la studenta restoracio, ni parolis pri Esperanto, kaj ni vidis ke estas kelkaj studentoj kiuj interesiĝas pri la lingvo. Por la kurso en la urba Esperanto-klubo (kie mi ankoraŭ ne estis, sed restas ankoraŭ sufiĉe da

tempo) oni devas pagi, kaj ĝi estas organizita tre malproksime al studentaj loĝdomoj. Tial Yoann kaj mi decidis organizi propran kurson. Ĉi vendrede ni havis la unuan kunvenon, bedaŭrinde kun nur unu knabo, sed aliaj promesis veni venontan fojon.

Fine, ne estas la urbo kaj la konstruaĵoj kiuj beligas mian restadon en Nancio, sed estas la homoj - novaj amikoj el diversaj eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. Germanoj, rumanoj, italoj, venezuelanoj, ĉinoj... Ĉiuj venis kun la sama ideo: profundigi sian konon de aliaj kulturoj, trovi amikojn pro kiuj oni poste vizitos eĉ pliajn landojn kaj ne malpli grave - por amuziĝi! Kaj

la amuziĝo certe ne mankas. Jen eĉ ĉi tiun artikolon mi sendas malfrue ĉar mi okupiĝis pri festoj, amikoj kaj vojaĝoj dum la tuta semajnfino. Nun mi scias ke la francoj vere manĝas multe da fromaĝo, trinkas vinon, pretas elspezi tro da mono por amuziĝi amikojn, scias nenion pri Eŭropo pli oriente ol Germanio kaj preskaŭ tute ne kapablas paroli la anglan. Sed mi tre fieras ke kelkajn inter ili jam estas miaj amikoj. Tiel la eŭropa ideo pri ERASMUS vivas, kaj ĝuste pro sia sukceso ĝi ĉiujare atiras pli kaj pli da studentoj. Ĉiu kiu la havas okazon partopreni, tiu partoprenu! ERASMUS estas neanstataŭiginda vivsperto.



NEKUTIMA HISTORIO DE FOTO-ALBUMO

Josip Pleadin

Dimanĉe jam tradicie en la kroata metropolo, sur la placo *Britanski trg* (loke nomata *Iliĉki plac*), okazas foiro de antikvaĵoj. Kanadano kiu transloĝiĝis por vivi en Zagrebo vizitis la foiron, kaj estante ŝatanto de malnovaj fotoj, hazarde ĉe strat-vendisto aĉetis tute neallogaspektan foto-albumon. Baldaŭ li rimarkis en ĝi Esperantajn notojn, kaj li montris la albumon al ŝia konato, la zagreba esperantisto Teodoro Mikiĉ. Pasis iom da tempo, kaj s-ano Mikiĉ pri tiu malkovro informis la sekretarion de Dokumenta Esperanto-Centro en Durdevac. Interesiĝanta pri ĉiaj Esperantaj materialoj, DEC tuj petis la permeson de la posedanto, ke oni trarigardu kaj skanu la fotojn, por aldoni ilin al la DEC-kolekto. La permeso estis rapide ricevita, kaj la albumo denove troviĝis ĉe Teodoro Mikiĉ, kiu transdonis ĝin al la prezidanto de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj Radenko Miloŝević. Li alportis la albumon al Vrbovec la 1-an de oktobro, kie li renkontiĝis kun la sekretario de DEC. Nur post mallonga pritaksado, estis konstatite, ke la trovajo estis junaĝa foto-albumo de fama kroata esperantistino Emilija Heiligstein/Lapenna (1910-1994). Kvankam tute surpriza montriĝis la fakto ke la albumo troveblis ĉe strat-vendisto, ni provas ĉerpi el ĝi la informojn por nia landa historio.

Emilija Lapenna naskiĝis la 9-an de majo 1910 en malgranda slovenia vilaĝo Gorjane en la regiono Kozje en slovenia parto de Stirio, nur ĉirkaŭ 50 kilometrojn de kroata ĉefurbo Zagrebo. Ŝi devenas el juda familio Heiligstein. Ŝi finis komercan mezlernejon en 1926 kaj komencis studi pentroarton kiun ŝi ne finis. Do, la trovita foto-albumo komenciĝas ĝuste en la jaro kiam



Emilija (staranta meze)

ŝi ekstudis la pentroarton (1927). Antaŭ la dua mondmilito, precize en la tempo kiun pritraktas la albumo, ŝi estis oficistino en

la Ŝtata Financa Direkcio kaj postmilita statistikistino en la respublika Statistika Instituto de Kroatio ĝis la emeritiĝo.

Laŭ la konata biografio, ŝi esperantistiĝis en la jaro 1931. Ŝi multe vojaĝis en la tiama Jugoslavio, kaj tiujare ŝia albumo mencias la urbojn Split kaj Dubrovnik, sur la adriatika bordo. Du jarojn antaŭ tio, en marto 1929, Ivo Godek kaj Ivo Lapenna, studentoj de la Zagreba Universitato, apenaŭ fininte la mezlernejon, fondis en Zagrebo Studentan Esperantistan Klubon, kiu havis la taskon propagandi Esperanton inter la studentoj de la Universitato. En la biografio de Emilija ne estas klare skribite kie ŝi studis pentroarton, sed estus logike ke tio estis en la plej proksima, Zagreba Universitato. El tiuj jaroj datas ankaŭ ŝia konatiĝo kun Ivo Lapenna, ŝia posta edzo (ili geedziĝis en 1940). Supozeble do ŝi fariĝis esperantistino enkadre de la SEK,



Kvinjara jubileo de Studenta esperantista klubo



La 5-a landa kongreso en Slavonski Brod



Studentoj-esperantistoj



Sur Triglav en Slovenio

kiu estis praformo de Akademia Esperanto-Klubo (sub tia nomo fondita en 1937). Ŝi estis ĝia funkciulo kaj aktivulo ĝis la fino de ĝia ekzisto en 1941. La vojaĝo al Split kaj Dubrovnik en 1931 supozeble havas ion komunan kun Ivo Lapenna, ĉar li devenis el la dalmatia regiono (Split).

En la albumo ni trovas du fotojn pri la 5-jara jubileo de SEK, kiu estis solene festita la 5-an de marto 1933 en la halo de "Kolo", la nuntempa Akademio pri teatra arto. Sur tiu foto Ivo Lapenna sidas en la unua vico apud Danica Bedeković, la nestorino de la Esperanta movado en Kroatio. Sur alia foto Ivo kun aliaj du viroj gvidas la festan kunsidon.

Sur pluraj fotoj en la albumo videblas Ivo Lapenna en situacioj kiujn ni ne konas el lia posta riĉa esperantista kariero. Ivo Lapenna ellernis Esperanton kiel studento en 1928 aŭtodidakte, nur unu jaron antaŭ la fondo de SEK, kies ĉefa iniciatinto li estis. La tre aktivaj esperantistoj karieron li devis interrompi en la jaroj 1933/34, kiam li soldatservis en Lernejo por rezervaj oficiroj de Jugoslavia armeo en Tuzla. Apartan paĝon en la albumo de Emilija ni trovas pri tiu temo, kaj ĝi notas ankaŭ la precizan tempon - inter la 20-a de decembro 1933 kaj la 20-a de septembro 1934. Des pli, ni trovas ankaŭ la fotojn de Ivo en la soldata uniformo, kaj plurajn scenojn el la soldata vivo kaj la kazerno.

Aparta ĉapitro estas du landaj (tiamaj jugoslaviaj) Esperanto-kongresoj: la 5-a okazinta en Slavonski Brod en majo 1932, pri kiu ekzistas oficiala foto, sed en la albumo ni trovas du aliajn grupfotojn, kaj la 8-a okazinta en Osijek inter la 31-a de majo kaj 1-a de junio 1935.

Interesa foto montras Ivon kun grupo da montgrimpantoj sur la pinto de Triglav, la plej alta monto de Slovenio, en aŭgusto 1933, do kelkajn monatojn antaŭ soldatiĝo. Sidantan sur la bordo de Adriatika maro kaj naĝantan en Omišalj (insulo Krk), ni vidas Ivon dum lia feriado inter la 7-a kaj 15-a de julio 1936.

Kvankam temas pri privata kolekto de fotoj, la trovaĵo klarigas ankaŭ multajn detalojn el la vivo de Ivo Lapenna mem, kaj lian rilaton al Emilija Heiligstein, ĉar ŝi videblas en multaj situacioj sur la fotoj apud li, kaj la notoj en la albumo montras, ke profunda rilato inter ili ekzistis multe pli frue ol ili geedziĝis. La albumo ankaŭ kompletigas niajn eksciojn pri Emilija mem, pri kiu ekzistas nesufiĉaj informoj, kvankam ŝi ludis unu el la plej gravaj roloj en la jugoslavia Esperanto-movado.

KUNVOJAĜU AL LA 79-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO EN SICILIO

Kunlabore kun la Loka Kongresa Komitato de la 79-a Itala Kongreso de Esperanto, Orbis Pictus de Viŝnja Branković preparas por kroataj esperantistoj la kunvojaĝon kaj partoprenon en tiu kongreso, kiu okazos de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto 2012 en Mazara del Vallo (Sicilio), la marborda urbo, vidalvide de Tunizio. En la urbo - hodiaŭ unu el la plej grandaj fiŝistaj havenoj en Eŭropo - samkiel en la tuta insulo, spireblas la spuroj kaj la etoso de la kulturoj romia, greka, turka, araba, itala ...

Oni kongresos kaj loĝos en la 4-stela Hotel Hopps, en dilitaj kaj unulitaj ĉambroj.

La LKK donas specialan loĝadprezon por partoprenantoj el malpliriĉaj orientaj landoj.

La legantoj de "Zagreba Esperantisto" povos ĝis la 15-a decembro 2011 profiti la novembran aliĝperiodon ĉe Orbis Pictus kaj havi la prezon de 308,00 eŭroj (7 plenaj pensioj en 2-lita ĉambro, aliĝkotizo por partopreno en ĉiuj programeroj /krom la ekskursaj/, organiza laboro kaj elspezoj de Orbis Pictus).

Aktuala prezo de individua flugbileto el Triesto estas ĉ. 105,00 eŭroj (revenbileto inkluzivanta ĉion, krom la asekuron kaj eksterkabinan valizon).

Rilate la ekskursojn, eblos elekti inter la ekskursaj ofertoj de LKK, Orbis Pictus aŭ memzorgaj ekskursprojektoj.

Dum la lastaj jaroj italaj kongresoj estas tre partoprenindaj, ĉar tre internaciaj (kun "itala minoritato"), ekskursplenaj (ĉiutage estas ofertataj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj) kaj programabundaj. Krom multaj koncertoj kaj teatraĵoj, kunvenoj kaj altkvalitaj prelegoj, eblos partopreni diversnivelajn kursojn de Esperanto kun elstaraj instruistoj kaj ekzameniĝi laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro. La partoprenantoj de la kongrestema seminario ricevas la subvencion de Eŭropa Unio.

Pere de Orbis Pictus eblos poparta pagado (ankaŭ en Kroatio), samkiel eĉ malpli alta prezo por rapidaj finpagantoj (ĉiam kun rezignooblecoj).

Bonvenu, do, al unu el la plej grandaj kaj gravaj venontjaraj Esperantaj aranĝoj en Eŭropo!

La kompletan oferton eblos ricevi de:

ORBIS PICTUS de Viŝnja Branković
orbispictus@iol.it
poŝtelefono: + 385/ 99 50 11 912
www.ipernity.com/home/orbis



Estonto de AIS kaj senataj elektoj dum la ĵuspasinta sesio

Jam antaŭ la ĵuspasinta 32-a, rumania Universitata Sesio la senato de AIS esprimis sian zorgon, ke dum la pasinta senatperiodo (2008–2011) ne troviĝis novaj fortoj por la administra laboro de AIS. Tiu temo estis diskutata ankaŭ ekster AIS en la Esperanto-movado, ĉar Esperanto ja estas la precipa labora kaj administra lingvo de AIS.

Nova senato de AIS, laŭregule elektenda dum SUS 32, estis trovebla nur per tio, ke du ĝisnunaj vicseĝatanoj transiris en la "kernan" senaton kun kvin membroj. Ili estos (de 2012 al 2015, alfabeto sinsekvo):

Reinhard FÖSSMEIER (DE)
Hans Michael MAITZEN (AT)
Eva POLÁKOVÁ (SK)
Hans Dietrich QUEDNAU (DE)
Bengt-Arne WICKSTRÖM (SE/AT/DE)

Ĉar ne ĉiuj kvin elektitoj povis ĉeesti en SUS 32, la elekto (fare de la senato mem) de nova prezidanto estis prokrastita. Ĉi okazos ĝis la fino de 2011. La estonteco de AIS estis ankaŭ la temo de la Akademia Forumo. Tiu ĉi kontraŭis proponojn, ke AIS reduktu siajn instruajn kaj ekzamenadajn aktivadojn al iom da distanca instruado, se tio estas iel evitebla.

En la fina tago la ĵusa sesio okazis laŭtradicie la studfinaj ekzamenoj. Per "adapta adopto" (= re-ekzameno de grado akirita de alia institucio) doktorigis ĉe AIS Sara Konnerth (Sibiu-Hermannstadt, RO) kaj Zlatko Hinš (Zagrebo, HR).

Fragmentite el
<http://www.ais-sanmarino.org>



SUS 32 EN SIBIU (RUMANIO)



Akademio de la sciencoj (AIS) San Marino preskaŭ ĉun jaron okazigas siajn sesiojn. De la 23-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro 2011 okazis Sanmarineca Universitata Sesio (SUS) 32 ĉe Universitato Lucian Blaga en Sibiu (ULBS). Sibiu, alinomata Hermannstadt, situas en la centra parto de Rumanio, kaj en jaro 2007 ĝi estis Eŭropa urbo de kulturo.

La ĉi-jara SUS komenciĝis neformale la 23-an de septembro per Interkona vespero, kaj sabaton la 24-an de septembro okazis malfermo, post kiu sekvis la konferenco pri komunikado, kreivo kaj esploroj en didaktikaj profesioj kun koncernaj referaĵoj. London, la 25-an de septembro okazis programeroj konsistantaj el kursoj kaj prelegoj.

En la kursoj prelegis la AIS-profesoroj: Bojidar Leonov el Karlovo (Bulgario) pri "Bazaj principoj de patent-ĉi scienc-teknika informado", Ljubiša Preradović el Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino) pri "SPSS - Priskriba statistiko", Eva Poláková el Komárno (Slovakio) pri "Scienco, filozofio kaj etiko", Alicja Lewanderska-Quednau el Haag (Germanio) pri "Eŭrologio" kaj Věra Barandovská-Frank el Paderborn (Germanio) pri "Dialogo kaj interkompreno en interlingvistika laboro de Otto Jespersen". Reinhard Fössmeier el Munkeno (Germanio) prelegis al studentoj de Universitato en Sibiu informadikon, pro kio dum SUS okazis la kursifina ekzameno

por ULBS-studentoj surbaze de antaŭaj devigoj, kaj sekvis ankaŭ la kurso en la semajno post la regula SUS.

La prelegoj rilatis al diversaj temoj prezentitaj de AIS-profesoro. La nuna prezidanto de AIS San Marino Fabrizio Pennachietti prelegis pri "Fenico-punikaj vortoj en eŭropaj lingvoj", Arno Warzel pri "Pri la komunikadteorio de Schulz von Thun", Eugen Macko pri "Dialogika kompreno kaj Esperanto", Alicja Lewanderska-Quednau pri "Kio estas etno-identeco-asimilado? Kio estas diasporo?", Hans-Dieter Quednau pri "La instruteko de AIS". Ljubiša Preradović prezentis la eldonon titolitan "Sopstvena bi(bli)ografija – preuredena – Propra bi(bli)ografio – reordigita" de la serba tradukisto kaj poeto Boriša Milićević okaze de lia 80-jariĝo kaj 58-jara aktiva Esperanto-laboro, kaj la prospekton kun fotoj kaj geografiaj mapoj pri renovigitaj preĝejoj kaj aliaj objektoj en la serba ento de Bosnio kaj Hercegovino titolita "Religiaj objektoj de naciaj minoritatoj en Respubliko Serba".

Zlatko Hinšt el Zagrebo prelegis pri sia doktora disertacio en formo de komputila prezentaĵo de Esperantlingva adapta adapto la 28-an de septembro sub la titolo "Prezroj kaj eksteraj efikoj kiel determiniloj de ekonomia situacio de fervoja sistemo". Poste, la 1-an de oktobro, Zlatko Hinšt defendis ĝin dum

proceduro de ekzamenkomisiono por re-ekzamenado de originala nacilingve akirita doktora grado, montrinte difinitajn partojn kaj eksplikinte ilin surbaze de originala kroatlingva disertacia verko, akirinte la gradon "doktoro pri humansciencoj" kiel agnoskita titolo de AIS. La 30-an de septembro Z. Hinšt faris aldonan prelegon "Eksteraj efikoj kaj ilia internalizado" kiel kontribuon al pli bona kompreno de lia disertacia temo kaj ankaŭ al memstara kompreno de la koncerna problemaro. Estas menciinde, ke rumana gastigantino de SUS, profesoro de Universitato en Sibiu Sara Konnerth, antaŭe doktoriĝis en sia lando kaj la 1-an de oktobro sukcese prezentis kaj defendis ĉe AIS sian adaptan adopton pri instruado en informadiko.

Dum SUS 32 en Sibiu kunsidis ĝenerala asembleo de AIS San Marino, dum kiu estis elektitaj kvin senatanoj, inter kiuj ili elektas prezidanton de AIS por periodo 2012-2015. Pri estonteco kaj aktivecoj de AIS oni diskutadis dum kunvenoj de la t.n. Akademia forumo. Pritakso estas ke en AIS San Marino "dum pasinta senatperiodo (2008-2011) ne troviĝis novaj fortoj por la administra laboro de AIS" (la vortoj inter citsignoj rilatas al unu detalo el raporto pri SUS 32 en AIS retejo). Vidu la koncernan retejon <http://www.ais-sanmarino.org> inkluzivanta aliajn detalojn.

Neniu el la hejmanoj memoris bone kiam Vida plenkreskis (sur ŝi strange speguliĝis la vivetapoj), sed ilin ĉiujn necerte longe premas la penso kiamaniere forsendi ŝin.

Kaj ŝi eterne sidas sur la elfrotita forkiĝo de giganta kverko kaj tra blua vitropeco rigardas la lazuron kaj blankajn sennomajn insulojn. Ŝi atendas blankan velon en la lazura intermontejo de la neloĝataj insuloj.

Kiam iu deziras fortiri ŝin de sur la loko de ŝia atendado, ŝi mansvingas kaj alproksimigas la fingron al la buŝo. Ovala vizaĝo, tute eta, kaj grandaj okuloj kun malheleoraj punktetoj – eterne forestantaj. Kaj belaj kaj teruraj. Ŝia robo longa, griza kiel ŝtono.

Se oni longe ĝenas ŝin kaj forpelas la iluzion, ŝi furioze falas de la alto kaj blasfemkrias, dum la hejmanoj nur krucsignas kaj neniu aŭdacas alproksimiĝi al ŝi. Poste ŝi, senkonscie, vagadas ĉirkaŭe, kaj ĉiuj kondamnas ŝin, ĉar neniu komprenas kio okazis al Vida. Neniu eĉ konjektas ke sur ŝia malluma ĉielo subiris la sola ekaperinta suno.

Iun tagon la patrino de Vida alvokis la arbogardiston Jureta, kiu dum la rondinspekto de la regiono alvenadis ĝis la Valo.

Forspireginte la amaran guston de la trinkajo, Jureta viŝis la flavetajn kaj bruldifektitajn lipharojn kaj diris al Anuka:

– Jojaĉa estas malriĉul', sed ŝparema kaj elforĝos kion la koro ekdeziras.

Kaj oni perforte forsendis Vidan en montaran vilaĝeton lokitan en griza rondvalo, ĉirkaŭita de rokoj kiuj direktitaj al la ĉielo kiel dentoj de kruta montaro, fermis la horizontojn al ĉiuj flankoj de la mondo.

Sub la arbustaro sur iu altebenaĵo, kovrita per malabundaj herboj – oblikva kabano, nigra kiel la pinto de fumtubo de iu subtera loĝejo kondukanta en la inferon. En unu domparto – fajrujo kun nigra

kaldronĉenaro, kaj en la alia, inter la balgoblovido kaj karbamaso – la nigra, malalta Jojaĉa, senbarba, de nedifinita aĝo, kaj kun granitaj, krudaj muskoloj, sed etkapa kun inflamitaj okuloj alte sur la frunto.

Iu najbarino kun diverskolora ŝnuraro kvazaŭ kun serpenteplektiĝo ekhaltis survoje.

– Kiel fartas vi kaj la edzo?

RAKONTO PRI BLUA VITROPECO

Stjepan Vukušić

– Ne estas la edzo sed la satano – respondis Vida kvazaŭ ŝi estus delonge atendinta tian demandon.

Kaj Jojaĉa ekde la mateno ĝis la nokto, aŭ batadis per martelo brulruĝan feron, aŭ forte tiradis la ŝnuron sur la balgoblovido, rigardante per sangmakulitaj okuloj la karbardaĵon. Pro la arda lumo li rapide konfuziĝas, kaj kompense li vidas la jam realigitan sonĝon: li sidas kun Vida antaŭ dometo el blankaj ŝtonoj, supre sur la altebenaĵo, kaj la venteto allugas de la proksimaj montoj, dume en la malproksimo, inter la montbazo kaj la flanko de iu insulo videblas marstrio kiel blua rivero ... Komenciĝas densa, malvarma pluvo kaj li forsendas Vidan en la domon kaj lasas sin trempiĝi per malvarmaj ŝprucaĵoj.

Tie, sur la altebenaĵo, li ofte sidas kiel malharmonia birdego kaj petas ŝin ke ŝi revenu hejmen, sed ŝi mansvingas al li kaj alportas la fingron al la buŝo.

Li revenadis al la laboro kun dampita doloro en la ventro, elkreskinta kun la tempopaso je la peco de brulruĝa fero.

Kaj ŝi en iu mistera rapideco diradis al ĉiuj ke ŝi atendas blanke vestitan mariston por ke li "forrabu ŝin de ĉi tiu satano". Kaj ŝi rapide elprenadis la foton envolvitan en peceto de forpaliĝinta atlaso. Sur la kristale lazuraj akvoj blanka kaj svelta ŝipo kaj post ĝi nerealaj linioj de insularo kun palmoj en la posttagmeza sonĝo. Kaj maldekstre en la lazuro sinkas la flugiloj de laro. Kaj Vida malfermas la okulojn kaj rigardas pli belan bildon – la iluzion naskiĝintan el la ĉielarka guto.

Kaj kiam Jojaĉa aŭdis tion, el la nigra kabano elflugadis kaj diskrevadis ardiĝintaj splitoj kiel el la vekiginta vulkano. Tie li ankaŭ tranoktadis inter la balgoblovido kaj amaso da karbardaĵo.

Sur la bruliĝinta vizaĝo staras liaj okuloj kiel du vundetoj. Komence li konfuziĝas kaj tiu loko kie en la ardiĝinta cerbo elkreskis blanka dometo, fariĝis por li la plej antipatia en la mondo.

Vida plue kutimis sidi sur la akraj herboj en la intermontejo de grizaj rokoj kaj tra la blua vitropeco rigardadis la malglatan strion de la malproksima lazuro. Sed ankaŭ ĉi tie ŝi ne trovis la trankvilon. Malglataj ŝtonegoj, grizaj pro la eterna malsekeco, kun torditaj likenoj ie ĉe la supro, memorigis ŝin pri Jojaĉa kaj pri liaj okuloj.

Iun tagon persekutata de mortotimo, ŝi forkuris tra ravinoj kaj malsekaj ŝtontabuloj, tra sablofluejo kaj arbustaro – ĉiam pli foren al la maro. Tra la senvojetoj alvenis ŝi kun vunditaj plandoj, nudpieda, al la paŝtela ŝoseo kaj direktiĝis norden al la Valo. La rigidaj pupiloj strange pligrandiĝis, nepenetreblaj, fremdaj al ĉio kaj al ĉiu. Ŝi kaŝadis sin de ĉiuj irantaj renkonten al ŝi, timante ke ili resendos ŝin al Jojaĉa. Afliktita, ŝi sidigis en la herbaĉon antaŭ la konata pordo. Senhoma vilaĝo en la silento de

mateno kaj de kvietaj lazuraj valoj. Laodoro de migdalarbaj ŝeloj kaj de maturaj figoj.

Kaj Vida ascendas sur la forkriĝon de la giganta kverko serĉante la lumon de la perdita mondo.

Ora guto ektuŝas la supron de unu insulo kaj la maro, eldorme, ekbaŭmas milde en la klara ovalo de la lazuro. Lumigita interne ŝi fermadis la arbotrunkon levita en la flugon de korpodisiĝo. Poste ŝi kuŝis sur la soifa, diskreviĝinta tero ĉasante malfruiĝintajn fajrerojn kun laodoro de sekiĝintaj herboj. Poste descendadis de la ŝoseo virinoj kaj alportadis al ŝi nutraĵon, riproĉante ŝin ke ŝi "tia" grimpas sur la arbon.

Ekkrioj en la senhoma Valo devoĝigis la direkton de unu barko. Alveninte la unuaj, viroj tuj forlasis la domon kaj ekscitite instigis virinojn rapidi laŭlonge de la kruta vojo.

Ekde tiu tago la virinoj laŭvice iris al la Valo portante al Vida bezonaĵojn.

Kaj kiam iu virino demandis pri Vida kaj pri la infano, la alia respondis al ŝi:

- Eee, kiu tion, filineto, ne vidis, tiu ne scias kiel oni preĝas al Dio.

Tiam oni forsendis ŝin al Jojaĉa kun la knabeto.

Tiele ŝi dum jaroj forkuradis kaj estis forsendata al Jojaĉa sola aŭ kun novnaskitoj, kiuj naskitaj apud la vojoj aŭ en staloj, kreskadis apud li, nigraj ĉe la karbadaĵo, kun la ĉemizoj ĝis la maleoloj.

Kaj Jojaĉa nigra kiel karbo kaj sekiĝinta, kun sangvundetoj alte sur la frunto, forĝis ludilojn por la infanoj, nutris ilin kaj alvokadis ilin el la arbustaro.

Ŝi revenis instige de iuj parencoj (ili mem alkondukis ŝin tute proksime de la domo) kaj ŝi, envolvita en silkan kaptukon, kverelas kun la plenkreskinta filino kaj argumentas al ŝi ke ŝi

ne estas ŝia patrino ĉar ili ambaŭ estas samaĝaj,

Kaj al Jojaĉa denove ardiĝas kaj terure bruligas lin tiu fero en la internaĵo. Tiam li fuĝas super sian forĝejon kaj englutas la aeron aŭ trinkas malvarman akvon kun pecetoj de putriĝinta foliaro.

Apenaŭ ili sukcesas atingi la randon de la unuaj rokoj de kie sternas sin pli vastaj horizontoj, la infanoj laŭvice foriras de Jojaĉa kaj fariĝas fremdaj servistoj kaj paŝtistoj. Kun li estis ankoraŭ la plej juna filo, silentema, ĉarma knabeto, neordinare bela.

Tiam alvenis iu parenco kiun Jojaĉa apenaŭ memoris.

"Kion la infano faru ĉe vi? Rigardu kia vi estas! Li sovaĝiĝos ĉi tie kaj iĝos sama kiel vi", parolis ŝi bruske kaj preparadis la infanon kvazaŭ tio estus jam delonge en ŝiaj manoj.

"Li sovaĝiĝos ĉi tie kaj iĝos sama kiel vi" - tio deprenis de Jojaĉa la forton por batali.

Forirante, eĉ ne unu retrorigardis, kaj li restis sur la surtretita novalo kvazaŭ karbiĝinta, en la atuna nebulo, kun malklaraj vundetoj alte sur la frunto.

Vida vagadis sur la herbaĉo antaŭ senhomaj domoj kaj kelkfoje ekiris laŭlonge de krucigitaj bretoj sur la blinda fenestro, tiam ŝi iom ekridus kaj ekirus for. En la ĝardenoj ŝi kolektis sekan branĉaron kaj ŝirkolektis migdalojn kaj figojn. Kun plena korbo ŝi foriradis en la vilaĝojn apud la ŝoseo kaj tie ofertis por la vendo. Virinoj aliradis al ŝi enpoŝigante al ŝi falditajn monbiletojn kaj prenante manplenon da migdaloj aŭ kelkajn figojn.

Al la pli juna virino ŝi dirus:

- Malmulte vi prenis, fratino! - kaj nepre ŝi volis ke ŝi prenu pli. Kaj al la virinoj kiuj estis samaĝaj ŝi turnis sin per

"baptopanjo" aŭ "onklino".

Ciam ankoraŭ ŝi surgrimpadis la gigantan kverkon, sed kun la jaroj forpaliĝis la sorĉaĵo de la sceno. Malofte, kaj nur por momento, aperis brila fajrero kvazaŭ el la brulrestaĵo sub la cindro, kaj poste antaŭ ŝi kuŝis morta fotografajo.

Tiam estis en la submontaran ŝtonregionon entranĉita nova ŝoseo, pli ebena kaj pli larĝa, la ŝoseo mortkolora kaj kun kapturnaj rapidoj, parto de alia fora mondo kaj la fatalo de multaj estaĵoj de ĉi tiu regiono, kiuj la malnovan kaj paŝtelan ŝoseon (kuŝanta ĉirkaŭ la griza asfalto kiel mortaj membroj) portis en la sango kiel pratempan kutimon kaj parton de heredita ritmo.

Iun tagon kurkolektiĝis virinoj ĉirkaŭ la griza aglomeraĵo apud kiu ruĝis sur la asfalto sangmakuloj kaj piedpremitaj figoj kaj foren ĉirkaŭe disŝutiĝis sekaj migdaloj.

En la mallarĝa koridoro de la vidvino Jeka ekhaltis Jojaĉa deprenante la ĉapelon. Vida kuŝis sur la benko. Supre de la ĉifita nigra robo - la eta rigida vizaĝo: figuro el kreto. Sur la frunto kvazaŭ iaj ruĝinkaj strioj.

Jojaĉa levis al la frunto la manon pezan kiel mallonga frapilego, kaj tiam ekiris en la gastejon por brandotrinko. Poste li ekvojis al la Valo. Perforte li disrompis la fermitan pordon. Li elĵetadis sur la vilaĝan vojon la postrestaĵon de la mortintino en la daŭre kreskanta furiozo, kvazaŭ li liberigis en ĝi de la rusto de tiu delonge elfandita fero ie en la internaĵo.

Sur la defrotitajn ŝtontabulojn kaj sur la herbon de la interspacoj falis deformitaj pantofloj kun brilaj agrafoj, trivitaj tukopecoj el brokato kaj silko, elskrapita teleraro kaj fulgigitaj potoj, vitraj elipsoidoj kun envefitaj diverskoloraj rubandoj. Kaj tra la tuta antaŭdomo disrompiĝis vitreroj kaj fajreroj de la blua vitropeco tra kiu Vida rigardadis la lazuron inter la blankaj insuletoj.

Poste preterpasis ĉi tie la infanoj el malriĉaj domoj portantaj en la poŝo strobilojn, sed neniu el ili kuraĝis ektaŭsi la buntajn vitroglobetojn, ĉi simbolojn de malfeliĉo.

Kaj la granda kompakta suno fajreris kiel fajra floro en la branĉaro de la giganta kverko. Ileksoj apud la rando de la valoj senvorte haltis en la soleco de la mateno. La vitropecoj disĵetitaj sur la herbo kaj rokoj ekflamis kiel gemoj.

Kaj sur la alia flanko – la ora insularo kaj la novnaskita lazuro kun svelta veleto naĝanta kvazaŭ blanka floro.

*El la kroata tradukis:
Ivo Borovečki*



STJEPAN VUKUŠIĆ (1931-) istria lingvisto, universitata profesoro, poeto, novelisto kaj romanverkisto. La gimnazion vizitis en Senj. Pri la kroata, rusa kaj franca lingvoj diplomigis ĉe la Filozofia fakultato de la Zagreba Universitato. Lia aparta scienca laboro estis dediĉita al la akcentologio de la kroata lingvo, pri kio li verkis plurajn librojn kaj artikolojn. Emeritiĝis kiel universitata profesoro ĉe la Filozofia fakultato en Pula (Istrio). Kiel verkisto publikigis kvar poemojn, kvar novel-kolektojn kaj ses romanojn. Liaj poemoj kaj prozo estis tradukitaj al la slovena, itala, germana kaj Esperanto.

I.B.

BOOKBOX EN ESPERANTO

 *Nicole Else*

La kompanio **BookBox** estas kreita de **Brij Kothari** en 2004. Brij Kothari naskiĝis en Hindujo en 1964 kaj pasigis sian infanaĝon tie, poste li studis ankaŭ en Usono kaj doktoriĝis. Unue li kreis neprofitan organizon **PlanetRead**. Kiam li estis en Usono li decidis vojaĝi al Sudameriko kaj pro tio li lernis la hispanan lingvon. Li spektis hispanajn filmojn kiuj havis anglajn subtitojn. Tiam li pensis, ke li eble povus progresi pli rapide en la lernado de la hispana lingvo se la filmoj havis hispanajn subtitojn.

En tiu tempo subtitoj estis vaste uzataj por filmoj en fremdaj lingvoj, sed oni ne kutime havis subtitojn kiuj estas en la sama lingvo kiel uzas la filmo. Kothari pensis, ke samlingvaj subtitoj povas esti tre utilaj kaj li ne pensis pri surduloj. Li pensis pri la fakto, ke en Hindujo multaj plenkreskuloj ankoraŭ kapablas legi nur ege malbone kaj ke aldoni subtitojn al ŝatataj filmoj kaj kantoj povas multe helpi. Tiel plenkreskuloj povas lerni legi en tre agrabla maniero kaj tre malmultekoste spektante televidon. Kaj efektive nun multaj filmoj en Hindujo havas subtitojn en la sama lingvo, kio vere helpis multajn plibonigi legokapablon en diversaj hindaj lingvoj.

De tiu ideo poste evoluis la ideo helpi infanojn lerni legi. Brij Kothari kreis BookBox. Ili uzas la devizon “Krei unu libron por ĉiu infano en ĉiu lingvo”. Tamen ne temas pri libroj surpaperaj. La celo estas disvastigi la librojn perrete, per televido kaj per poŝtelefonoj. Do la libroj de BookBox estas por infanoj kaj ankaŭ por plenkreskuloj kiuj lernas legi aŭ lernas fremdajn lingvojn. La uzantoj aŭskultas la rakontojn, legas la samlingvajn subtitojn kaj rigardas la moviĝantajn bildojn. La unuaj libroj jam en pluraj lingvoj estis elŝuteblaj kontraŭ pago fine de 2004. La rakontoj estas aĉeteblaj ankaŭ sur lumbildoj.

Kiel mi eksciis pri BookBox? Antaŭ certa tempo mi serĉis sur Youtube infankantojn en la rusa lingvo, kaj mi trovis rakonton de BookBox en la rusa lingvo. Mi rigardis ĉu ili havas ankaŭ aliajn filmetojn kaj rimarkis, ke ili havas la saman rakonton en multaj lingvoj kaj kun subtitoj kiuj tre helpas por kompreni lingvon kiun oni ankoraŭ ne perfekte regas. Tio fascinis min kiu ŝatus iom lerni multajn diversajn lingvojn.

Mi vizitis la retejon de BookBox kaj vidis ke ili tute ne havas rakontojn en Esperanto, sed mi trovis lokon por klaki kie troviĝis la vortoj “Aldonu vian lingvon”. Mi sugestis, ke ili aldonu Esperanton. BookBox tuj akceptis kaj mi komencis traduki la unuan rakonton: “La unua puto”. Poste mi elektis leganton por la rakonto kaj BookBox aldonis muzikon kaj moviĝantajn bildojn. La rezulto de nia kunlaboro estas videbla ĉe www.youtube.com/watch?v=_fmqZmaojaA

Esperanto estas la 31-a lingvo uzata de BookBox. Ili deziras havi pliajn rakontojn en Esperanto, do mi jam daŭrigis la tradukadon. Multaj el iliaj rakontoj estas videblaj senpage sur Youtube.





PRI LA 84-a SAT-KONGRESO

Mi kredas, ke mi ne eraros dirante, ke ĉirkaŭ 70 ĉeestintoj de la 84-a SAT-kongreso ĝuis tiun ĉi belegan unusemajnan restadon en Sarajevo. Nur mi ne komprenas kial inter la ĉeestintoj el ĉirkaŭ 20 eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj mi ne trovis pli da esperantistoj el proksimaj najbaraj landoj. Nur du personoj el Serbio, du personoj el Kroatio, neniŭ el Respubliko Serba, neniŭ el Slovenio, neniŭ el Montenegro, neniŭ el Albanio, neniŭ el Makedonio ... Ĉu ankoraŭ daŭre bacilo de maltoleremo venenas parton de Esperantujo sur nia teritorio?

Kristina Kujundžić (Subotica, Serbio)

REEĤOJ EL LA JARKUNVENO DE UZE

Mi estis gasto de la jarkunveno de UZE, kaj mi pardonpetas se mi eble ion miskomprenis. Kun ĝojo mi akceptis viziti tiun kunvenon, esperante ke oni parolos almenaŭ parte kroatlingve, ĉar mia Esperanto-scio ne estas tro bona. La prezidanto de UZE post kelkaj Esperanlingvaj vortoj parolis kroate, kaj la aliaj partoprenintoj ankaŭ. Post kelkaj salutvortoj, la prezidanto dankis al la prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), ke ŝi trovis tempon por ĉeesti. En sia parolado la prezidantino akcentis, ke Zagrebo ĉiam estis la centro de kroata Esperanto-movado, kaj ke la zagreban esperantistaron oni ĉiam alte taksis kaj respektis. Ŝi diris, ke UZE nun devus transpreni la taskon altiri en siajn vicajn la membrojn de la malfondita ES "Bude Borjan", por ke la membraro ne malaperu. Post tiuj trafaj vortoj la prezidantino esprimis sian dubon, ke eble la kunsido ne havas kvorumon, kaj ke ĝi estas kontraŭstatuta! Unue mi pensis, ke la rimarko estis bonintenco, ĉar la prezidantino ĉiam devas zorgi pri laŭleĝa funkciado de kunvenoj. Tamen estis konstatite, ke la kvoromo ekzistas. La voĉmurmuro de

iu ĉeestintoj sciigis al mi, ke ne temas nur pri kutima "protekto de legaleco"! Surprize oni eksciis, ke la eksmembraro de la malfondita societo estis varbita por fariĝi nur individuaj membroj de KEL, kaj ke ili ne aliĝu al UZE. Repreninta la vorton, la prezidantino de KEL kontraŭstaris ies proponon por aŭtomata membriĝo al UZE, ĉar ĝi ne estas anstataŭanto de "Bude Borjan". Post iom da tempo mi komprenis, ke la murmurado okazis pro la konsilo publike dirita en la malfonda jarkunsido de "Bude Borjan", ke la membraro de tiu societo membriĝu unuavice al UZE. Kiel mi sciigis, la sama invito estis lanĉita ankaŭ de la Estraro de Kroata Esperanto-Ligo. Oni parolis ankaŭ pri nepreco, daŭrigi la merkredajn prelegojn dum kiuj oni kontinue parolis Esperanton, kaj la prelegon akceptis organizi ĝuste UZE, transprenante la antaŭan taskon de "Bude Borjan". Iom post iom mi malkovris la ĝis tiam nekomprenitajn detalojn, respektive ian streĉitecon, kvazaŭ ian konflikton inter la KEL-kaj UZE-estaroj. Kelkfoje oni devojiĝis ekster la tagordo. Estis akcentitaj problemoj de instruado de Esperanto en lernejoj, uzebleco de unu aŭ alia lernolibro ktp.

La kulmino de la kunveno venis, kiam la prezidantino riproĉis ke la 4-a numero de "Zagreba Esperantisto", novpresita kaj distribuita ĝuste dum la jarkunveno, estas tro bona. Ŝi klarigis, ke tre ganda kvalito de la gazeto povus en la modon montri la situacion en la kroata Esperanto-movado pli bona ol ĝi vere estas. Se mi rajtus ion diri, mi esprimus surprizon pri tia opinio, sed pro mia rolo de gasto, mi silentis. Respondis la plenumredaktoro s-ro Josip Pleadin, menciinte laŭdon kiujn UZE ricevas pro la kvalito de la revuo el ĉiuj mondopartoj.

Estis duboj ankaŭ pri la pasintaj kaj estontaj labortaskoj. Neniŭ demandis pri tio kiel oni solvis la pasintjaran financon situation, malgraŭ la ekscio ke la fonto de financoj por du pasintjaraj numeroj de "Zagreba

Esperantisto" restis – neklarigitaj. Dankon al esperantisto kiu bonvolis traduki mian tekston, kaj al UZE-anoj ĉar ili decidis publikigi ĝin. Mi esprimas mian decidon aliĝi al UZE sen ia ajn dubo pri utileco de tia ago!

N.N. (la nomo konata al la redakcio)

KOREKTO


En la numero 3/2011 de "Zagreba Esperantisto", en la teksto "Kroataj esperantistoj militviktimoj" (paĝoj 68-69), aperis malĝusta naskiĝjaro de Josip Vranić. Li naskiĝis en la jaro 1970 (kaj ne en 1979 kiel estis skribite en la koncerna artikolo). Pri tio atentigis nin la legantino kiu volis ekscii pli pri tiu juna esperantisto. En nia arkivo estas notite, ke li pereis en la golfo Kašuni, ĉe la suda flanko de Marjan (la monto ĉe Split, Dalmatio), kiel la unua militviktimo en tiu regiono. Kun la taĉmento de 40-milimetraj kanonoj el la 66-a malpeza kanon-raketa divizio de Kroata mararmeo, li devis kontroli la golfon de Kaštela, bloki la kazernon en Divulje kaj la marbazon Lora, kiun tenis la tiama Jugoslavia militmaristaro. En la posttagmezaj horoj de tiu tago, lia taĉmento pafis per kanonoj al la torpedŝipo de Jugoslavia militmaristaro, sed la jugoslavaj ŝipoj komencis intensan pafadon el ĉiuj armiloj. Josip Vranić estis la celisto, kaj li estis trafita per pafo el 20-milimetra kanono. Pro la forta pafado, lia korpo estis evakuita apenaŭ vespere de tiu tago, la 24-an de septembro 1991.

ABONHELPA FONDUSO 2011

- | | |
|----------------------|---------------|
| 1. Boris Di Costanzo | 10,00 kunaĵoj |
| 2. Anto Mlinar | 10,00 kunaĵoj |
| 3. Hori Jasuo | 3,00 eŭroj |
| 4. Ljubica Sedmak | 20,00 kunaĵoj |

Viaj kontribuoj daŭre akceptataj!
Ĝir-konto: 2340009-1110321529
UEA-konto: uzes-y
Koran dankon al la kontribuintoj!

PROMENE LAŬ 100-JARA "LUNGOMARE"

 Zoran Ćirić

Al la 3-a MEVO (Marborda Evento), kiu okazis de la 14-a ĝis la 16-a de oktobro 2011 en Opatija kaj Lovran, alvenis esperantistoj kaj iliaj proksimumoj el Kroatio (Osijek, Vrbovec kaj Zagreb), Serbio (Niš) kaj Italio (Trieste).

Kvankam negranda grupo, la partoprenintoj povis loĝi favorpreze, grupete aŭ individue, laŭplacé en 2-, 3- kaj 4-stelaj hoteloj de ambaŭ urboj.

Belvetera semajnfino meze de oktobro ebligis al la aliĝintoj de tiu ĉi feria kaj ripoziga kunestado agrablan tritagan partoprenon en la kultur-gastronomia manifestacio, la tradicia "38-a Marunada" en Lovran, dediĉita al konataj lovranaĵ maronoj. Tamen, neplanite, kiel ĉefa "rolulo" de la aranĝo elstariĝis la jubileanta "Lungomare", la fama kaj belega 12-kilometra apudmara promenejo inter Lovran, Opatija kaj Volosko, kiu fariĝis 100-jara! Pri ĝi la MEVO-anoj edukigis inaŭgure en Urba Turo de Lovran, per ekspozicio de malnovaj bildkartoj de la urbo, per artdokumenta filmo pri la promenejo kaj per tute nova spektro de suveniroj kiujn, per ĝi inspirita, kreis la regiona artistino Marina Prijatelj.

Multajn plurhorajn promenojn, laŭ la spuroj de eŭropa aristokracio, artistoj kaj turistoj, faris ankaŭ niaj partoprenintoj: grupete, pare, individue, ĉu lante ĉu sportritme, ripozige aŭ laciĝe...

Gasto de la aranĝo estis nia veterano, la 81-jara Saša Kocian, multjara sekretario de Esperanto-societo "Liberiga Stelo" el Osijek, kiu al eksterlandaj gastoj prezentis sian tradukon (el esperanto al la kroata) de la konata hungara romano "Sklavoj de Dio", kiun ĉi-printempe eldonis Grafokom el Đurđevac kaj kiun la tradukinto mem financis.

La MEVO-anoj ĝuis ankaŭ ekskursete, naĝeje, kafeje, kukeje ... liberelekte.

La 4-a MEVO okazos de la 30-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 2012, dum la dua printempa semajnfino, kiu inkluzivos ankaŭ la konatan "ŝerctagon". La organizanto, Orbis Pictus, bonvenigas vin al tiu gaja kaj ŝerca semajnfino samregione, kun la konsilo profiti la decembran, ekstremafavorprezan aliĝon. Interesiĝu ĉe orbispictus@iol.it; +385 / 99 50 11 912 - www.ipernity.com/home/orbis.

 Višnja Branković

